

Varmega kongreso en
Florenco

Nordkorea vento en UEA
(Vortoj de Komitatano Z)

Herzberg am Harz:
la unua Esperanto-urbo
en la mondo

La kongresa sezono:
multaj kongresoj kaj
renkontiĝoj en diversaj
mondopartoj

TEJO havas novan
prezidanton

EU: la irlanda oficialiĝas

Nova traduko de
malnova letero de
Ludoviko Zamenhof

Jubileo de Ivan Franko

Poemoj el Madagaskaro

LA ONDO de esperanto



Septembro 2006. №8-9

Internacia sendependa magazino en Esperanto

La Ondo de Esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO 2006. №8-9 (142-143)

Aperas ĉiumonate

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov

Refondita en 1991

Eldonas kaj administras: Halina Gorecka

Redaktas: Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj:

Tatjana Auderskaja, Dafydd ap Iago, Wolfgang Kirschstein, Alen Kris, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Sergio Pokrovskij, Aloísio Sartorato, Serge Sire, Maria Sokolova

Adreso: RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Telefona: (4012) 656033

Elektronika poŝto: sezonoj@gazinter.net

Hejmpaĝo: <http://Esperanto.Org/Ondo>

Abontarifo por 2007:

Internacia tarifo: 32 eŭroj

Orienteŭropa tarifo: 18 eŭroj

Ruslanda tarifo: 390 ruslandaj rubloj ĉe Галина Романовна Горецкая (236039 Калининград, аб. ящик 1205)

Aerpoŝta aldono: 5 eŭroj

Perantoj: vidu la liston en la februara kajero (paĝo 23).

Konto ĉe UEA: avko-u

Recenzoj:

Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

Eldonkvanto: 700 ekzempleroj

Anonctarifo:

Plena paĝo: 100 EUR (2000 rubloj)

Duona paĝo: 60 EUR (1200 rubloj)

Kvarona paĝo: 35 EUR (700 rubloj)

Okona paĝo: 20 EUR (400 rubloj)

Malpligrandaj: 0,50 EUR aŭ 10 rubloj por 1 cm²

Kovrilpaĝa anonco, kun aldono de plia koloro, kostas double. Triona rabato por ripeto en la sekva numero.

Donacoj:

La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto "avko-u" ĉe UEA.

Oni povas represi kaj traduki materialon el "La Ondo de Esperanto" nur kun indiko de la fonto.

© La Ondo de Esperanto, 2006.



"La Ondo de Esperanto" (Волна Эсперанто). 2006. № 8-9 (142-143).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р.

Редактор: Корженков А.В.

Подписано в печать: 21 августа 2006 г.

Цена свободная. Тираж: 700 экз.

Отпечатано в Польше.

Presita en Pollando.



Nordkorea vento en UEA

Sekreteмо infektis nian mondan asocion. La pinton atingis Michela Lipari, sekretario de la Belartaj Konkursoj, kiu unue publikigis la rezultojn de la ĉi-jara konkurso dum publika programo en la UK kaj tuj poste deklaris ilin sekretaj, por ke UEA povu diskonigi ilin tra siaj oficialaj kanaloj. Imagita povo super aliaj verŝajne donis grandan plezuron al nia serĝentino, sed la lerta redaktoro de *Libera Folio* premiis ŝin per publika ridindigo. Plej bone ridas, kiu laste ridas.

Lipari ne estas la sola kaŝemulo en UEA. Pli serioza estas la deziro de Lee Chong-Yeong sekretigi la elekton de la nova estraro. En Florenco la eksprezidanto, nun ano de la elekta komisiono, anoncis, ke la kandidatoj devos resti sekretaj "ĝis la lasta minuto". Eĉ tiam la membraro ne eksciis ilin, ĉar la komisiono "rajtas informi nur la komitaton". Lee diras, ke lia celo estas apliki la "azian kutimon" ŝpari al la malvenkintoj perdon de vizaĝo. Ĉu estas interkultura analfabeteco dubi la pravon de Lee? Oni ne perdas vizaĝon, se oni perdas en demokratia elekto. Tio certe validas ankaŭ en aziaj demokratioj, kie elektoj sur ĉiuj niveloj de la publika vivo estas jam establita praktiko kun venkintoj kaj venkitoj.

Sendepende de kulturaj diferencoj la elektoj devas sekvi la regulojn de UEA, kiuj siavice sekvas la leĝojn de Nederlando. La komisiono devos raporti pri kandidatoj jam kelkajn monatojn antaŭ la elektoj, ankaŭ pri tiuj, kiujn ĝi ne rekomendos. Kiam la raporto atingos la komitaton, ĝi ne plu estos konfidenca. En tiu ĉi rubriko ni ofte pledis por kreo de elekta etoso en UEA kiel ŝanco por ĝenerale aktivigi la membraron. Tiurilate vasta publikeco tra la tuta elektoprocezo estas nepra kondiĉo. Baldaŭ UEA ekserĉos kandidatojn por komitatanoj B, kiuj reprezentas la individuajn membrojn. Ĉu al la fina baloto oni allasos nur tiom da kandidatoj, kiom oni elektos, por ke neniu perdu vizaĝon? Ĉu imiti TEJOn, kie por ses komitatanoj B aperis du kandidatoj?

Alia eksprezidanto, kiu ekstaris kontraŭ la "tiel nomata demokratio", estas Humphrey Tonkin. Li volas, ke la komisiono proponu estraron kun nur unu kandidato por ĉiu loko. "La komitato miskomprenas sian rolon, se ĝi kredas esti parlamenta". Tonkin elreviĝis, ĉar la komitato kutime produktas estrarojn, kies anoj poste plejparte montriĝas netaŭgaj. Estas tamen danĝere malpromocii la komitaton al nura stampilo de la elektokomisiono aŭ de kiu ajn alia grupeto de saĝuloj. Oni vere devas koncepti ĝin kiel parlamenton, ĉar tiel oni emfazas ĝian rolon en la demokratio de UEA. Elekti kaj kontroli la estraron estas la kulmino de tiu rolo. La komitato reprezentas la membrojn kaj tiel donas al ili la senton, ke UEA estas ilia asocio. Se ĝi estus kastrita tiel, kiel Tonkin proponas, forfalus bazo de tiu sento. Cetere, se la komitato emas elekti fuŝajn estrarojn, kiel ĝi povus esti pli sukcesa elektante la estrar-elektan komisionon?

Ju pli da kandidatoj kaj ju pli da publikeco, des pli bona la rezulto. Norda Koreio ne estu la modelo.

Komitatano Z

Kovrilpaĝe. La Turon en Pizo apogas (de live dekstren) tri infankongresetaniĝoj: Lelia el Britio, Gretel el Francio kaj Michaela el Germanio. (Fotis Bert Schumann)

Varmega kongreso

En la fermo la ĝenerala sekretario de UEA Ulla Luin eknomis la florencan Universalan Kongreson “La suna kongreso.” Mi volonte nomus ĝin “varmega”, ĉar sunajn kongresojn ni ja havis ankaŭ en malpli varmaj landoj. La komenco de la kongresa semajno estis aparte varma, eble multe super 30 gradoj. Kiam komenciĝis la komitata kunsido en la unua tago, ekpluvis, sed post la fino de la kunsido ne plu eblis rimarki, ke la pluvo iel influis, eble nur fortigis la sufokecon de la varmo per plia humido.

“Ni ne venas al Florenco nur pro la kongreso, — komentis ruslanda amiko kaj daŭrigis, — se la urbo estus iu alia, la kondiĉoj estus neakcepteblaj”.

Nu vere, jes. La kongresejo estis malnova palaco aŭ pli ĝuste tri diversaj konstruaĵoj kun la granda korto inter ili. La ĉefa kongresejo estis fakte pli granda interne ol de ekstere, ĉar randa parto situis sub la tero. Sub la tero estis ankaŭ la disdonado de dokumentoj, kaj, se rigardi el la ĉefa pordo, ĝia situo estis la plej malproksima. Eĉ mi, plurfoja kongresano, devis komence demandi kien iri, ĉar la gvidtabulo, kiu indikis la ĝustan direkton estis kaŝita malantaŭ pordo.



Florenco. Antaŭ la Kongresejo. (Fotis Maurice Sujet)

La kongresejo estis klimatizita, sed ĉi-foje la ĉefa kongreseja hotelo ne situis tuj apude, sed necesis piediri en varmege 300-metrojn. Fine de la semajno kiam la ekstera temperaturo komencis proksimiĝi al la kutimaj nordaj temperaturoj, la klimatiza sistemo ne plu same fidine laboris kaj foje estis pli varme interne ol ekstere. Iam en la fino de la semajno kiam estis aparte agrable malvarmete interne, iu ĝitalo jam flustris ĉu ne estas tro malvarme ĉi tie.

La korto estis centra loko kaj necesis trapasi ĝin plurfoje tage de unu ejo al alia. Multaj ankaŭ restis sur la korto ĝuante la kongreson. La korto estis ankaŭ loko por la Movada foiro, nova aranĝo kiu ebligis al landaj kaj fakaj asocioj kaj al plej diversaj esperantistaj organizoj, ni ja povas imagi ilin, prezenti siajn estontajn aranĝojn aŭ alimaniere informi pri sia ekzisto kaj varbi novajn anojn. Foje la kombinoj estis amuzaj: kune prezentis sin blinduloj kaj samseksemuloj aŭ ateistoj kaj naturistoj. Ne ĉiam facilis rekoni ĉu la konato sidanta ĉe la tablo reprezentis tiun aŭ la alian organizon.

La kongresejo ankaŭ ĉi-foje ne estis planita por nia Universala Kongreso, do mankis la ĉefa salono por du mil homoj.

Ĉi-foje la solvo estis proksime, trans la strato en fortikaĵo Basso, sed la salono tie estis aparte malpraktika. Nur triono el partoprenantoj povis spekti la malfermon rekte, dum en la flankoj du trionoj devis kontentigi sin kun ekraĵoj (el kiuj videblis fakte pli bone ol en la meza parto de malantaŭ).

En la malfermo la kongreso havis eksteran gaston kun esperantlingva prelego. Temis pri François Grin, kiu ne estas esperantisto, sed kiu kapablis legi esperantan tekston. Lia prelego estis certe interesa, sed la legado ne donis al la teksto necesan parolan stilon kaj tiel ĝi ne aŭskulteblis ĉiam kun plezuro. (Ni lernis pri tio: Humphrey Tonkin faris brilan prezenton kun Wera Blanke pri la publika parolado dum la kleriga lundo.) Espereble la prelega teksto de Grin legeblis baldaŭ en iu revuo aŭ rete.

Krome Grin diris ankaŭ tion, kion esperantistoj kutime ne aŭdis pri si mem aŭ ne emas aŭdi. Ekzemple, ke la mesaĝo de esperantistoj ne ĉiam allogas neesperantistojn aŭ ke esperanto ne estas iu mirakla solvo por lingvaj problemoj.

Krome necesas laŭdi la prezidanton Corsetti pro lia brila parolado: nome li kuraĝe deklaris ke Esperanto naskiĝis en Florenco. Ne, li ne freneziĝis kaj ne fanfaronis antaŭ la urba reprezentanto, sed emfazis, ke moderna pensmaniero, kies unu rezulto Esperanto estas, naskiĝis en Florenco. Tie naskiĝis, dum la libera respubliko de Florenco estis



sieĝata de la imperiestra armeo, ankaŭ la statuo de Davido, kiu por Corsetti reprezentis esperon, ke ankaŭ la esperanta Davido povas venki super la nuntempe reganta lingva ordo.

Vera bonŝancilo estis la prospekto *Kiel manĝi sen bankroti en Florenco*, kie troveblis favorkostaj kaj bonaj eblecoj manĝi. Ĝi krome estis havebla en la retejo de la kongreso jam pli frue kaj tiel utilis al tiuj, kiuj alvenis al Florenco antaŭ la komenco de la kongreso. La vera perlo estis la fervojista manĝoservo, kie prezoj ne nur malaltis, sed kie per kongreseja kupono eblis ricevi sep-procentan rabaton. Kelkplada manĝo kun vin-boteleto kostis nur malpli ol sep eŭroj. Simile kostis kafo kaj eta kuko en urbocentra kafejo, kien mi foje eraris eniri dum vespera promeno.

Por tiuj, kiuj mem ne tiom kongresumis, ankaŭ la kongresa insigno estis bonŝancilo: nome eblis viziti la muzeojn (inkluzive la famajn artajn muzeojn) senpage per simpla montrado de la insigno. Tiel ankaŭ la vicoj fariĝis malpli grandaj, ĉar eblis rekte iri al enirejo kaj ne unue viciĝi por biletoj. Mi mem estis tro ligita al la kongresejo, sed mia edzino uzis unu tagon por muzeoj.

En la kongreseja hotelo liftoj funkciis nur hazarde, kelkaj hoteloj ruze, optimisme promesis pli da ĉambroj ol ili fakte havis (esperante ne-alvenon de kelkaj kongresanoj) kaj devis aranĝi por kromaj gastoj alian tranoktejon (pri kiu la alvenantoj aŭdis nur en la hotelo), en la kongresejo foje praktike ne eblis aĉeti eĉ kafon, ĉar unu kelnerino provis servi al deko da klientoj kaj kuris intertempe al telefono, la kongresa kuriero malfruis kaj netroveblis facile, reta konekto mankis... Nu, feliĉe ankaŭ fermotempoj ne estis tre ekzaktaj, la plurlingva malpermeso rampi sur la herbejo ne estis aplikata, reta konekto troveblis plurloke en la urbo.

Jukka Pietiläinen

Kvizo? Ne. Kvizoludo!

Kutime la kvizo, kiun mi gvidas en Esperantujo (FREŜO, GRUPE, BEF k.a.) okazas po unu horo ĉiutage dum kelktaga renkontiĝo. Por la kvizo oni bezonas salonon kun tabloj (ĉe kiuj kvizanoj sidas kaj skribas solvojn) kaj komputilon kun printilo.

Sed en la Florenca kongresejo ne estis salono kun tabloj! Ĉu rezigni? Ne! Necesis ŝanĝi la koncepton por adapti la kvizon al la novaj cirkonstancoj.

Tiun novkonceptan kvizon oni spektis 1 aŭg 2006 en la salono *Canuto* en la Florenca UK. Malgraŭ la teknikaj problemoj la kvizo trakis glate kaj preskaŭ senprobleme (85% de la plano), ĉar la sep kviz-helpantoj (italo, judo, ĉinino kaj gepoloj) pli frue ricevis la scenaron kaj kelkfoje renkontiĝis por trejni sin.

La nova koncepto konsideris du principojn:

— la demandoj rilatu al Esperanto (movado, historio ktp.), ja la kvizo okazas en la Universala Kongreso de Esperanto;

— la tuta aranĝo estu pli *spektaklo* (angle: *show*) ol la ordinara kvizo; tial mi preferas nomi ĝin “kvizoludo”.

Premioj estas bezonataj por ke venkintoj ricevu ne nur kontenton, sed ankaŭ ion plian. Por Florenco mi ricevis premiojn de Margareta Handzlik (multaj malgrandaĵoj kaj E-libroj), de Kazimierz Leja (abonoj de *Pola Esperantisto* kaj E-libroj), de *Sezonoj* (abono de *La Ondo de Esperanto*), de ISTK en Bydgoszcz (senpaga studado en Esperanto en la Studumo en Bydgoszcz).

Inter naŭ kvizanoj, kiuj prezentiĝis surpodie, la unuan premion gajnis **István Ertl** (Luksemburgio), kiu ricevis diplomon, vinon, E-librojn kaj jarabonojn de *La Ondo de Esperanto* kaj *Pola Esperantisto*. La duan premion konkeris Tatjana Auderskaya (Ukrainio), kiu krom diplomon kaj E-librojn gajnis jarabonon de *Pola Esperantisto*.

La kvizoludo, laŭ mi, estis sukcesa, ĉar la salonego estis preskaŭ plenpleniĝita de kvizemuloj, neniu dormis, kaj nur malmultaj foriris dum la aranĝo.

Mi volonte plu okazigos kvizoludojn dum E-aranĝoj, precipe se estos interesaj premioj por la venkintoj.

Marian Zdankowski

La Ondo gratulas la du venkintojn, kiuj (ĉu hazarde?) estas niaj konstantaj kunlaborantoj! Venontjare Marian Zdankowski gvidos sian kvizoludon en la 4a Balta Esperanto-Forumo en Kaliningrado.



Florenco. Librojn elektas Bertilo Wennergren (dekstre), la aŭtoro de PMEG, kiu rapide elĉerpiĝis en la kongresa libroservo. (*Fotis Kalle Kniivilä*).

Francoj plejmultis en Florenco

Al la Florenca UK aliĝis 2209 kongresanoj el 62 landoj. Rimarkinda estas la relative granda proporcio de aliĝoj el landoj ekster Eŭropo, entute 494 (22,4%). Surloke enskribiĝis multaj italaj kongresanoj sed ne sufiĉe por detronigi Francion for de la pinta loko. Laŭ la definitiva statistiko al la 91-a UK aliĝis 302 esperantistoj el Francio kontraŭ 279 el Italio. Pli ol cent kongresanojn sendis ankaŭ Japanio (181), Germanio (159) kaj Pollando (129).

La landoj kun pli ol 20 aliĝintoj estas: Ruslando (97), Brazilo (73), Belgio (72), Hispanio (64), Litovio (58), Usono (49), Britio kaj Nederlando (po 47), Svislando (44), Svedio (43), Hungario (42), Kroatio (41), Danio (40), Ĉeĥio (38), Ĉinio (34), Korea Respubliko (32), Serbio (31), Finnlando kaj Israelo (po 29), Bulgario (27) kaj Kanado (22).

GK UEA

Rezolucio de la 91a Universala Kongreso de Esperanto

La 91a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninta en Florenco (Italujo) kun 2209 partoprenantoj el 62 landoj,

konstatinte,

— ke la Jardeko de Edukado por Daŭropova Evoluigo 2005–2014 estas grava kadro por iniciatoj cele al evoluo kiu estu socie dezirinda, ekonomie vivkapabla, kulture taŭga kaj ekologie daŭrigebla;

— ke nuntempe ekzistas gravaj minacoj kaj al biodiverseco kaj al kultura kaj lingva diversecoj, pro la reciproka dependeco inter la homo kaj la naturmedio;

— ke la nuna superrego je monda skalo de unu lingvo havas maltrankviligajn ekonomiajn, sociajn, kaj edukajn efikojn koncerne daŭropovecon, lingvan ekologion kaj la rajton je komunikado;

— ke la strebado de la Esperanto-movado al lingva demokratio kongruas kun la valoroj de transnacia edukado celanta informitajn, aktivajn civitanojn, kiuj estu kapablaj kritike kompreni sin mem kaj la ĉirkaŭan mondon por partopreni la evoluoprocedon respondece kaj solidare.

Alvokas la Esperanto-komunumon aktive engaĝiĝi en la agadoj kiuj, sur diversaj niveloj, strebas antaŭenigi praktikojn koherajn kun la principoj de la bezonata ŝanĝoprocezo, kaj utiligi siajn lingvon kaj retojn serve al tiuj klopodoj.

Rekomendas al la Estraro de UEA doni al la ĉi-rilataj problemoj pli da atento en estontaj kongresoj kaj agadoj, partnere kun neesperantistaj organizaĵoj.

Konfirmas la pretecon de la Esperanto-komunumo kunlabori kun Unesko kaj aliaj organizaĵoj cele al tutviva edukado por paco, socia justeco kaj kultura diverseco, kaj atentigas ilin pri la lingva aspekto de daŭropova evoluigo.

Herzberg am Harz — la unua Esperanto-urbo en la mondo!

Unika evento okazis 11 jul 2006 en la germana urbo Herzberg am Harz. Ĝia urbestro, Gerhard Walter, petis en la kavalira salono de Kastelo Herzberg la urbajn deputitojn voĉdoni por la oficiala Esperanto-urbo Herzberg. Krom tri sindetenoj ĉiuj deputitoj (ili reprezentas kvar diversajn partiojn) voĉdonis por Esperanto. La nova oficiala nomo de la urbo fariĝas:

Herzberg am Harz – die Esperanto-Stadt / la Esperanto-urbo!

Antaŭ la voĉdonado inter la urbaj deputitoj estis ankoraŭ kelkaj, kiuj estis malcertaj, dubantaj, kontraŭantaj pri la propono. Pro tio ni ĝustatempe dissendis al ili leteron kun taŭgaj argumentoj.

La urbo en ĉiu kampo fiere subtenas kaj laŭ sia kapablo antaŭenigas la uzadon de Esperanto por neŭtrala internacia interkompreniĝo, kaj planas uzi la lingvon por montri al la mondo siajn homajn, turismajn kaj aliajn valorojn. La novan nomon surhavas, ekzemple, ĉiu oficiala leterpapero de la urbo.

Kion la urbo jam faris kaj daŭre faras por Esperanto?

— Esperantlingvaj urbaj vojmontriloj montras al la Esperanto-Centro;

— la oficiala leterpapero de la urbo surhavas la novan nomon: Herzberg — la Esperanto-urbo;

— Esperanto estas uzata por la ĝemelurbaj kontaktoj (Herzberg kaj Góra en Pollando) kadre de modelprojekto, kiu ofertas Esperanton por civitanoj kaj helpas la disvastigon de la lingvo por interkomunikado;

— Esperanto-arkivejo funkcias en la malnova urbodomo;

— partatempa dungito de la urbo zorgas pri Esperanto-rilataj aferoj (kunorganizas programojn, disdonas Esperanto-afiŝojn, alvokojn por programoj, ktp.);

— la urbo provizas (senpage aŭ ege favorpreze) ejojn por Esperanto-kursoj, konferencoj, kunsidoj, renkontiĝoj, koncertoj, ktp.

Esperanto-Gesellschaft Südharz aktivas en Herzberg jam de 30 jaroj. Lastatempe funkcias Interkultura Centro Herzberg, respektive: Germana Esperanto-Centro (Klerigejo de GEA). Dum pli ol 30 jaroj Esperanto daŭre ĉeestas en la ĉiutaga vivo de la urbo, lokaj kaj regionaj esperantistoj senpaŭze multflanke aktivis por tiu sukceso.



la nova emblemo de la urbo aperas sur ĉiu oficiala leterpapero.

Estas multaj farendadoj por ke ni kune kreu Esperanto-infrastrukturon. En la Esperanto-movado ni bezonas ĉies subtenon, ideojn, la amaskomunikilojn, k.a. por bonkvalite merkatumi tiun unikan bonŝancon por Esperanto.

Tri personoj el Herzberg kaj du el Northeim vizitis la partnerurbon Góra okaze de amikeca renkontiĝo. La urbestro Tadeusz Wrotkowski kore salutis la partoprenintojn kaj substrekis la gravecon de la neŭtrala lingvo Esperanto. Venis gastoj el multaj polaj urboj kaj el aliaj germanaj urboj. Pli ol 30 gelernantoj kantis en Esperanto por la partoprenantoj de la E-renkontiĝo kaj koncertis publike sursceneje ĉe la sportplaco en la urba festo, kiun partoprenis centoj da urbanoj. La partoprenintoj ricevis belan memortason el porcelano *Góra 2006 Esperanto-klubo* kun multaj verdaj stelmotivoj. En nia ĝemelurbo estas nun regula kaj aktiva Esperanto-agado kun kelkaj kursoj.

31 jul – 14 aŭg okazis la 1a SALO (Somera Arbara Lernejo) en “Jugendwaldheim Rotenberg” en Herzberg-Pöhlde. Partoprenis ĉefe lernantoj el Góra, Herzberg, kaj el Tiszafüred (Hungario) kun geakompanantoj.

La urbestro de la Esperanto-urbo Herzberg, Gerhard Walter (meze en la stria T-ĉemizo), kun kelkaj kunlaborantoj de Interkultura Centro Herzberg.



Entute partoprenis pli ol 50 personoj. La projekton financis la urboj Góra kaj Herzberg kune kun “Dt.-Polnisches Jugendwerk”. Ni devas danki por la subteno al la du urbestroj Tadeusz Wrotkowski kaj Gerhard Walter, al forstisto Sonnabend, arbara lernejestro Otto Kern, Marika Frense, Ulrike Andörsch, Zsófia Kóródy kaj aliaj. Okazis ekskursoj, ekzemple, al Heidepark, rondveturado tra Harz-Montaro kaj aliaj interesaj travivaĵoj.

La urbestro de la nova Esperanto-urbo, Gerhard Walter, akceptis la gastojn en la urbodomo kaj mem organizis tablotenisturniron.

Pola ĵurnalisto kaj esperantisto Roman Dobrzyński venis por filmi la unikan ĝemelurban pilotprojekton en la nova oficiala Esperanto-Urbo. Li filmis en la urbo kaj en la nacia parko Harz, intervjuis la urbestron, kunlaborantojn de ICH, gelernantojn, kaj registris multajn epizodojn dum SALO, kie bone montriĝis la rezulto de la ĝemelurba projekto: *Esperanto kiel pontlingvo por internacia komunikado*. Li volas prezenti tion en pola televido, krome li planas verki ankaŭ esperantlingvan filmversion.

12 aŭg entute 25 personoj partoprenis la oficialan kursfinan ekzamenon de Germana Esperanto-Instituto. 23 personoj sukcesis, ĉar ili vere tre aktive lernis kaj praktikis Esperanton. La bona rezulto estas ĝojiga kaj donos novajn impulsojn.

ICH



NASK-2006: Katalin Kováts (kursgviganto *Esperanto 3000*), Ellen Eddy (kursrdiganto), Sylvain Lelarge (kursgviganto *Esperanto 2000*), Lee Miller (kursgviganto *Esperanto 1500*). (Fotis Margaretha Symoens)

34 geknaboj + 8 gepatroj

Ĉu vi jam spertis tian sociologian fenomenon, ke 4 virinoj kaj 4 viriĉoj vivas kun 20 knabinoj kaj 14 knabiĉoj? Ĉiuj kune loĝas en iu junulgastejo. Tio daŭras nur 7 tagojn kaj 7 noktojn, poste ĉiuj reiras al siaj originaj hejmlandoj: Brazilo, Eŭropo, Israelo, Japanio. Kutime, tiuj 8 geviroj nomatas ‘gvidantoj’ kaj estas gepatroj de iuj el la 34 infanoj. Almenaŭ unu el tiuj gvidantoj konas la landon, ĝian lingvon kaj aparte bone la urbon de la junulgastejo.

Kion faras tiu granda familio dum tiuj 7 tagoj? Ili vizitas palacon antikvan, turon oblikvan, biskvit-bakejon, zoon redukanta bestojn. Ili saltas el 5-metra alto en naĝejan basenon, ili vadas tra kaj baniĝas en montara rivereto. Ili lernas manĝi per bastonoj, kalkuli per sorobano, vesti kimonojn, origame faldi paperon, tiel kiel japanoj. Ili lernas novajn kantojn kaj tiujn prezentas al skabeno urbodoma. Unu el la knabinoj eĉ koncertas kun siaj gepatroj publike antaŭ ĉiuj.

Kion faras tiu granda familio dum tiuj 7 noktoj? Nu, multaj dormas kaj revas. Iuj junaj knaboj batalas per kusenoj ĝis laciĝo. Pli aĝaj kuŝas sur teraso, babilas longe kaj serĉas verdajn stelojn en LaktoVojo.

Se vi ankoraŭ ne scias, pri kio mi skribas: Temas pri IIK (Internacia Infana Kongreseto) okazinta samtempe kun UK en Prato apud Florenco. Nun relegu de komence! Poste rigardu fotetojn pri ĝi je retadreso: bertosch.free.fr/iik2006fotoj

NB: Tiuj 34 infanoj neniam plu mensogos, ĉar ili aŭdis pri la historio de Pinokjo kaj eĉ vizitis tiun parkon Pinokjo, kiel terure!

Bert Schumann

Refreŝiga Ondo de Esperanto!

Ĉi-jara NASK (Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto) okazis en montaro, apud Brattleboro (Vermonto, Usono). Entuziasmo, bonhumoro kaj petolemo radiis de la komenco ĝis la fino, malgraŭ la peza varmego. Partoprenis 25 lernantoj, plejparte el Usono, sed venis ankaŭ homoj el Japanio, Kanado, Belgio, Kroatio kaj Nepalo.

Ĉiu lernanto devis registriĝi je unu el tri malsamnivelaj kursoj. Ĉar nur la duanivela kurso okazis antaŭtagmeze (posttagmeze okazis la du aliaj kursoj), eblis partopreni Esperantajn lecionojn dum 6 horoj ĉiutage! Sed ne ĉiuj verduloj estas kapdolorĝuistoj: kelkaj pli ŝatis ĉeesti lecionojn dum nur tri horoj kaj krome promeni en arbaro aŭ naĝi en apuda rivero.

Mi preskaŭ ĉiutage partoprenis la duanivelan kaj trianivelan kursojn kaj ja povas atesti ke ambaŭ estis tre interesaj kaj lernigaj. Sylvain Lelarge talente gvidis la duanivelan kurson per kunkantado, amuzaj rakontoj kaj vigligaj ludoj. Katalin Kováts profesie temigis la tutan trianivelan kurson ĉirkaŭ la vivo de pentristo Vincent Van Gogh. Lee Miller, instruisto de la unua nivelo, laŭdire ankaŭ tre sperte instruis kaj dum la emociplena lasta vespero pluraj komencantoj kontente raportis pri siaj belegaj progresoj.

Ne nur la instruado estis altkvalita, sed ankaŭ la lernantaro. Ĉiuj diligente plenumis siajn hejmtaskojn kaj pluraj skribis artikoletojn por la *NASK-a Fasko* aŭ prezentis programerojn dum kulturaj vesperoj. Ĉiuj emis lerni de la aliaj kaj peresperante komunikadi.

Ne facilas enkapigi lingvon kiun oni ne povas uzi ĉiutage. Pro tio, NASK-2006 estis ne nur tre agrabla sed ankaŭ

tre valora sperto: la lernantoj rapide progresis, ĉar ili uzis Esperanton senhalte dum tri semajnoj. Pluraj NASK-anoj menciis emon popularigi Esperanton revenonte al siaj loĝejoj. La kialo estas simpla: se neniu krom mi parolas Esperanton en mia urbo, mi devos trovi esperantistojn kaj kuraĝigi ilin lerni, por mem havi eblecojn pluuzi ĉi tiun belegan lingvon ĝis onta NASK!

Brattleboro peze varmegis. En la tuta mondo 2005 estis la plej varma jaro de la jarcento, kaj ĉi tiu jaro ŝajne estos eĉ pli varma. NASK-2007 okazos en San Diego. Eĉ tie esperantistoj ne povos eskapi la rapidan tutmondan varmigon. Tio rememorigas min pri klera diraĵo de partopreninto el Japanio:

En la 1960-aj kaj 1970-aj jaroj, la japania Esperanta movado estis sufiĉe vigla, multaj junuloj ekinteresiĝis pri la lingvo; Esperanto estis ligata al paca idealo, tiutempe tre forta idealo en nia lando. Esperanto glitis sur popola ondo de pacemo. Sed la junuloj maljunigis, la pacema ondo kaj ankaŭ la Esperanta movado malfortiĝis. Junaj esperantistoj nun tre malmultas en Japanio, kaj ĝenerale japaniaj esperantistoj havas malmultajn kontaktojn kun eksterlandanoj. La pacema japania konstitucio estas serioze minacata de nuntempaj militemaj politikistoj. Ni do urĝe devas revigligi la porpacan idealon en Japanio. Sed nia Esperanta movado ankaŭ bezonas alkroĉiĝi al nova tutmonda, transnacia idealo. Kaj tiu idealo estas media prizorgado. Kiel responsaj homoj ni rapide haltigu nian frenezan memdetruan militon kontraŭ la planedon, por savi ĝin, por savi nin. Kiel esperantistoj, ni ankaŭ glitu sur pormedia ondo, sciante ke pli forta Esperanta movado ankaŭ signifas pliajn eblecojn kunagadi pormedie kaj porpace.

Mi tute konsentis. Ĉar NASK ebligas al ni uzi nian amatan lingvon pli lerte, internacie kaj ĝuige, ĝi vere estas refrerŝiga “Ondo de Esperanto”. Dum la “Ondo de Esperanto” en San Diego 2007, ni ankaŭ glitu sur tiuj mirindaj kaj emociigaj maraj ondoj kiujn nia planedo donacas al ni. Kaj, inter NASK-oj, ni plifortigu tiujn aliajn gravegajn ondojn sur kiuj la Esperanta movado nature glitas.

Boris-Antoine Legault

SET-54: nur 19 el 107

Ĉi-jare okazis la 54a Somera Esperanto-Tendaro en Lančov (Ĉeĥio), denove en tri dusemajnaj etapoj. El entute 107 kursanoj lernis Esperanton 19 personoj, la anglan 74 geknaboj kaj la germanan 14 homoj. Plie 6 el ili provis posttagmeze ankaŭ la hispanan.

Preskaŭ 200 litoj restis neokupitaj, do esperantistoj povus facile superi eĉ la anglan kurson, se ili ne evitus la tendaran vivon. Fine de la tria etapo renkontiĝis dudeko da iamaj tendaranoj, ankoraŭ de la tempo, kiam ĉiuj tri etapoj estis plenŝtopitaj de esperantistoj. Ĉe tendarfajro ili rememoris kaj kantis. Venontjare la tendaro festos sian 55an jaron kaj la ekstendaranoj sian 10an renkontiĝon.

La kursanoj estas en la aĝo 8–15 jaroj, escepte pli junaj. La pli aĝaj (super 16 jaroj) kutime laboras kiel t.n. “praktikantoj”, aŭ grupestroj, kiuj preparas la posttagmezan programon kun ludoj kaj zorgas pri la infanoj post la instruado. Kelkaj mem instruas aŭ helpas dum la instruado. La kursoj ne estas identaj kun la grupoj — en grupoj la geknaboj estas dividitaj laŭ la aĝo, en kursoj kompreneble laŭ la lernata lingvo.

Plenkreskaj kursanoj estas nur en Esperanto-kursoj. Tamen ankaŭ la infanoj el la angla kaj germana kursoj ricevas bazan informon pri Esperanto kaj ĝia movado, almenaŭ dum unu komuna instruhoro. La tuta tendaro kantas Esperante ĉe vespera malhisado de la flagoj (ĉeĥa kaj Esperanta).

Antaŭtagmeze oni lernas dum kvar instruhoroj kaj dum la kvina oni lernas komune kanti en la lernataj lingvoj simplajn kantojn. Posttagmeze la grupoj ludas sportajn ludojn kaj vespere kulturajn: oni ekzemple konkuras, kiu elpensos plej spritan reklamon laŭ televidaj modeloj, aktoras scenetojn el famaj filmoj, prezentas fabelojn aŭ siajn talentojn. La kultura programo kulminas dimanĉe en la mezo de la etapo per procesio de spritaj maskoj kaj per sekreta balotado por elekti plej belajn kaj plej simpatiajn tendaranojn. Realigas ankaŭ pluraj ekskursoj.

La trian etapon partoprenis francaj esperantistoj, geedzoj Claire kaj Laurent Philippe, kiuj baldaŭ akiris simpatiojn de ĉiuj infanoj, eĉ el la kursoj de la angla kaj germana, kiuj pro ili lernis kelkajn esperantajn kaj francajn vortojn.

Miroslav Malovec



Lančov. Kiun lingvon ili lernis en la Somera Esperanto-Tendaro. Ĉu Esperanton?

TEJO havas novan prezidanton

[Ĉar neniu petito raportis pri IJK-62, ni aperigas ĉi-sube resumon surbaze de artikolo en *Libera Folio*.]

La 62a Internacia Junulara Kongreso de TEJO (Sarajevo, 6–13 aŭg) laŭ la kvanto de aliĝintoj (420) estis malpli granda ol la pasintjara kongreso en Zakopane (564 aliĝintoj), sed pli granda ol la ceteraj IJK-oj post 1999, kiam la kongreso en Veszprém (Hungario) kolektis 500 aliĝojn.

En la 1990aj jaroj Sarajevo estis scenejo de kruelaj bataloj. Unu el la plej popularaj programeroj de la IJK en Sarajevo estis la diskutrodo pri la milito en eksa Jugoslavio, kaj multaj partoprenis ankaŭ aranĝon pri la rolo de islamo en tutmondiĝo kaj multkultureco. La temo de la kongreso estis ĝuste *Multkultureco kaj tutmondiĝo*.

La akceptado de alvenantaj kongresanoj estis nekutime rapida kaj bone organizita, opiniis spertaj kongresanoj, kaj preskaŭ ĉiuj planitaj eventoj okazis. Laŭ LKK-ano Samir Ribić multaj muzikistoj opiniis la koncertajn aranĝojn en Sarajevo aparte sukcesaj:

— La muzikisto Jomo kaj la muzikgrupo *Dolchamar* diris, ke tiuj ĉi estis la plej bonaj el iliaj koncertoj. Krome okazis folkloro vespero de popoldanca grupo *Trafikisto*, filma revuo de bosniaj kaj alilandaj filmoj, teatraĵoj *Judita*, *Galaktika stelŝipo Ludoviko* en epizodo *La muro de mallumo*, kaj *La urso*, koncertoj de *Esperanto Desperado* kaj de Doron Modan kun Kaja Farzsky...

Kiel kutime en paraj jaroj, en la IJK komencis sian mandatperiodon nova komitato de TEJO. Same kiel ĉe UEA, ankaŭ en la komitato de TEJO estas komitatanoj A, elektataj de la landaj kaj fakaj asocioj, komitatanoj B, elektataj de la individuaj membroj, kaj komitatanoj C, elektataj de komitatanoj A kaj B.

La balotado pri komitatanoj B devis okazi printempe, sed ĉi-jare denove ne okazis voĉdonado ĉar mankis kandidatoj. Por ses postenoj de komitatanoj B ĉi-foje kandidatis nur du personoj. Sekve la du kandidatoj, Ksenija Prilepskaja kaj Nicola Ruggiero, estis aŭtomate elektitaj, kaj kvar lokoj en la komitato restis vakaj. Ankaŭ en la periodo 2004–06 estis nur du B-komitatanoj, kio klare montras la organizan malfortiĝon de TEJO kaj la mankon de aktivuloj.

La antaŭa komitato de TEJO pasintjare elektis novan estraron por dujara periodo, sed en Sarajevo aperis neceso kompletigi la teamon. Heming Welde Thorbjørnsen jam antaŭ la kongreso anoncis, ke li forlasos sian postenon.

Kiel nova prezidanto estis elektita David-Emil Wikström (vidu lian sinprezenton en la 15a paĝo). Li ricevis 17 voĉojn en la komitato. Kandidatis ankaŭ estrarano pri eksteraj rilatoj Harris Subašić (7 voĉoj) kaj Katja Ignatieva (nul voĉoj).

La informa strategio de la ĉi-jara IJK evidente estis sukceso. La du ĉefaj gazetoj de Bosnio-Hercegovino, *Dnevni Avaz* kaj *Oslobođenje*, ĉiutage publikigis plurajn artikolojn pri la kongreso. Krome tri televidkanaloj kaj du radiostacioj havis diversajn elsendojn pri IJK-62.

Elita pilko por afrikanoj

La prezidanto de la Monda Esperanta Ligo por Sporto (MELS), Klarita Velikova, post la alvoko de la prezidanto de UEA pri la bezonoj de sportistoj en Afriko, aĉetis kaj sendis al la Esperanto-Asocio de Burundio donacon por ilia landa kongreso (7–10 aŭg 2006) — la plej belan (blankan-nigran-oran) kaj la plej multtekostan (ĉ. 140 USD) futbalan pilkon troveblan en Londono.

Ĝi estas pilko por profesia ludado — speciale preparita por la Mondpokalo 2006 en Germanio.

La pilko kun aliaj futbalaĵoj en la kesto kaj la emblemo de MELS estas simbola bondeziro kaj kuraĝigo por la Sporta Sekcio de la Esperanto-Asocio de Burundio. En tiu sekcio estas entuziasmaj sportistoj, dezirantaj disvastigi Esperanton per sporto.

Jürgen Kloker
Sekretario de MELS





En la centro de Novjorko

La 54a jarkongreso de la Esperantoligo por Norda Ameriko (ELNA) okazis inter la 21a kaj 24a de julio ĉe la Moda Instituto de Teknologio (Fashion Institute of Technology) en la centro de la granda urbo Novjorko. Partoprenis 85-90 homoj el Usono, Kanado kaj Japanio.

Okazis multaj interesaj prezentoj, inter kiuj Thomas Alexander diskutis la Esperantan Reform-projekton de 1894, Jeff Blakeslee priskribis la historion de la Internacia Helplingva Asocio kiu kreis la lingvon Interlingva, kaj Jim Henry prezentis la minimuman lingvon Toki Pona al interesitoj. Okazis ankaŭ poezia konkurso aranĝita de Robert Read, ekumena diservo gvidita de Filipino Dorcas, koncertoj de Jon Liechty kaj Thomas Alexander, kaj prezentoj de Judith Meyer pri komputila lingvistiko, Neil Blonstein pri Brazilo, kaj multaj aliaj.

Re-elektiĝis kiel estraranoj de ELNA Joel Amis kaj Lusi Harmon, kaj nove elektiĝis Trevor Andrews. Bill Harris reelektiĝis kiel kasisto. (Ĉiujare oni elektas trionon da estraranoj, kiuj havas trijaran oficperiodon. Filipino Dorcas restas prezidanto de ELNA: li elektiĝis en 2005, kaj lia ofico daŭros ĝis 2008.)

Estis decidite, ke la venontjara kongreso okazu en Tijuana, Meksikio. Post la kongreso, 15 kongresanoj kunvenis en la konvene nomita *Esperanto Cafe* en Vilaĝo Greenwich, kie ili regalis kelkajn neesperantistajn (kaj eble nedankajn) vizitantojn per diversaj kantoj en Esperanto.

Don Harlow, Jim Henry

BET-42 sur insulo

La 42aj Baltaj Esperanto-Tagoj okazis 4–8 jul 2006 en Kuressaare sur la insulo Saaremaa (Estonio) kun la slogano “Por unueco kaj diverseco de la popoloj ĉe la Balta Maro!” Partoprenis 137 personoj el 11 landoj.

Dum la tuta BET flirtis super la ĉefa enirvojo de Kuressaare bonveniga verda banderolo en Esperanto kaj la estona. La urbo montris sian favoron tiel, ke en la solena malfermo salutparolis s-ino Urve Tiidus, la urbestro de Kuressaare.

La programo konsistis el Somera universitato (prelegoj), amuzaj vesperoj, amatorarta konkurso, lingvokurso, ekskursoj, diservo k.a. La plej granda parto de la prelegoj temis pri Estonio: kuraĉlokoj kaj kuracado, naciaj kostumoj en la insularo, evoluo de estonlingva instruado, evoluo de Saaremaa, estonoj inter la finno-ugraj gentoj, Estonio hodiaŭ. Aldone ni aŭdis pri aliaj popoloj ĉe la Balta Maro, pri harmonio inter homo kaj naturo, kaj rememorojn pri unuaj BEToj.

En ekspozicioj estis montrataj bildkartoj de ĉiuj urboj de la UKoj de 1905 ĝis 2006 kaj multaj specioj de birdoj kun estonaj, latinaj kaj Esperantaj nomoj. La Libroservo plenigis tutan klasĉambron, kie mirinde multaj Esperanto-emblemoj kovris unu tablon. Ĉiuj partoprenantoj ricevis bele presitajn turismajn broŝurojn.

La amatorarta konkurso *Kannel* (Kantelo) havis plurajn branĉojn: kantado (sola aŭ ensemblo), deklamado de versaĵoj, aktorado, verkado de poezio, komponado de muziko.

Raita Pyhälä

Katolikoj kongresis en Ĉeĥio

8–15 jul 2006 okazis en la urbeto Velehrad en Ĉeĥio la 59a Kongreso de IKUE kun pli ol 130 gesamideanoj el 11 landoj.

La kongresa temo estis Eŭkaristio — renkonto kun Jesuo Kristo, kaj la kongresa emblemo enhavis ne nur la kongresan temon, sed ankaŭ Krucon. Temis pri Kruco Cirila-Metodia, strikte ligita kun aktivadoj de kunpatronoj de Eŭropo sanktaj Cirilo kaj Metodio en Velehrad. La kruco ankaŭ memorigis gravan eventon — viziton de Johano Paŭlo la Dua en Velehrad en aprilo 1990. Tiu ĉi granda blanka kruco kun la Papa blazono staras meze de la placo antaŭ Baziliko en Velehrad. La verda stelo kun la kruco kun la Papaj koloroj meze simbolas la katolikan Esperantomovadon.

Velehrad estas fama spirita centro, loko de oftaj ekleziaj pilgrimoj, renkontiĝoj kaj Cirilaj-Metodiaj festoj.

La kongreso estiĝis sub protektado de eminentaj katolikaj esperantistoj: Mons. Miloslav Kardinalo Vlĉ, patrono de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE), Mons. Jan Grabner, ĉefepiskopo de Olomouc kaj Metropolitano de Moravio, kaj Mons. Karel Otčenášek, ĉefepiskopo de Hradec Králové. Ili honoris la kongresanojn per siaj salutvortoj. Ankaŭ la prezidanto de la Papa Konsilio por Laikoj, ĉefepiskopo Stanisław Rylko, honoris la IKUEanojn per varmaj bonvenigaj vortoj.

La Kongreso pasis en frateca kaj amikeca etoso. La aĝo de la kongresanoj estis diversa, ĉie regis reciproka komprenemo kaj toleremo. La plej juna kongresano estis Elizabeth Masala el Francio, kiu alvenis kun siaj gepatroj.

La kongreson riĉigis interesaj prelegoj kaj ekskursoj — perpieda al civito Modrá kaj vizito de areo Lednice.

Ĉiuj kongresanoj ricevis la Kongresan Libron, kiu enhavis, inter alie, tre interesan priskribon de la Katolikaj Esperantistaj Tendaroj *Kiel ni aranĝis Katolikajn Esperanto-Tendarojn en totalisma sistemo*.

Ĉi-jare nialandaj IKUEanoj kontribuis al libra propono pere de sia senprofita traduko de libro de D-ro Drлік *Ĉeĥa kuracisto en koro de Afriko* pri la vivo de la nudpiedaj karmelanoj en misio de Centrafrika respubliko, kie vivis d-ro Drлік senprofite unu jaron por helpo al tiu malriĉega parto de la mondo.

Olga Glendová

Malgranda, sed tre internacia

De 29 jul ĝis 11 aŭg okazis la 4a Somera MEzeuropa RENkontiĝo (SOMERE) apud la germana urbeto Jünkerath en la Eifel-montaro, inter Kolonjo kaj Trier. Partoprenis 39 homoj, el kiuj la duono venis el eksterlando (Belgio, Britio, Ĉinio, Francio, Nederlando, Pollando); dek el la ĉeestantoj estis infanoj.

La renkontiĝejo ĉarme situas meze de arbaro, kio ebligis multajn plaĉajn promenojn. Sur la tereno vivas kelkaj bestoj — ŝafoj, kaproj, kunikloj kaj katoj — kion ĉefe la infanoj aprezis. (Pri alia besto, hundo kunportita de partoprenantino, okazis “pentekosta miraklo”, kiel ŝerce diris iu: La hundo, kiu kutimas *ne* obei, kiam oni vokas ĝin en la germana, ankaŭ *ne* reagis, kiam oni vokis ĝin en Esperanto.)

Tre alloga estis la granda elekto de eksterdomaj kaj endomaj ludiloj, kiujn la domo ofertas. El diversaj ludoj oni kunmetis specon de Olimpikaj Ludoj kun dek disciplinoj, en kiuj la partoprenantoj gaje kaj entuziasme konkuris. Krome eblis elekti el kolekto de plej diversaj kunportitaj ludoj.

En prelego de Isabelle Six eblis konatiĝi iom kun la gestolingvo de surduloj, kio tre amuzis la ĉeestantojn. Prelego de Danka Leyk temis pri “asertiveco” — la kapablo okupi kaj konvene teni sian pozicion kaj la proprajn interesojn en sociaj rilatoj. Ludger Schmeink prezentis orgenludadon kun detala klarigo de la funkciigo de orgeno. La ĉeestantoj povis spekti muzikan prezenton de la verko de Charles Darwin, partopreni cirklodancojn kaj “bio-dancon” kaj senstreĉiĝi per gimnastiko. Por komencantoj kaj progresantoj pri Esperanto oni ofertis kurson, konversacion, rondon pri problemoj de la grammatiko kaj komunan legadon de tekstoj el la Esperanto-literaturo.

Kelkaj ekskursoj gvidis al muzeo pri fero kaj gisado, kastela vilaĝo, vulkanĝardeno kun geologiaj vidindaĵoj, kavaĵo kaj najbaraj urbetoj. Sed eble la plej ŝatata programpunkto estis ankaŭ ĉi-jare la libera babilado, ĉu posttagmeze en la ĝardeno sub plaĉa kverko, ĉu vespere en nia kafejo.

La 5a SOMERE estas planata denove por la unuaj du semajnoj de aŭgusto 2007; la organizantoj serĉos taŭgan renkontiĝejon en la limregiono de Belgio, Francio, Luksemburgio kaj Germanio.

Lu Wunsch-Rolshoven
EsperantoLand



Partoprenantoj de ISLA-2006 sur la Respublika Placo en la ĉefurbo de Armenio.
(*Fotis Reza Torabi*)

Forta impulso en Armenio

Internacia Somera Lernejo en Armenio (2–9 jul 2006) komenciĝis ĉe la montara perlo de Armenio — la lago Sevan. Kvardeko da esperantistoj el kvar landoj piknikis, interamikiĝis, kune kantis kaj dancis. Ĉi tie okazis ankaŭ enkonduka prelego de la prezidanto de ILEI, Radojica Petrović, kiu afable konsentis gvidi la instrumentodikan seminarion dum ISLA-2006 kaj prezenti la projekton “Interkulturo”.

La Lernejo daŭris en Diliĝan, fama montara kuraĉloko, kien venis pli malgranda grupo el 25 homoj. Ĉi tie komenciĝis serioza laboro. Instruistino Araksja (Inna) Elbakjan sukcese paroligis eĉ preskaŭ neparolantajn lernantojn, uzante dum la instruado elementojn de la rekta metodo. La progresigan kurson gvidis Reza Torabi (Irano).

Tre interesaj temoj estis elektitaj por la metodika seminario, kiujn prezentis Radojica Petrović. Prelegoj koncernis interkulturan lernadon kaj edukadon, instruadon al diversnacia studentaro, protektadon de kultura kaj lingva diverseco. Okazis diskutoj pri problemoj de interkultura komunikado. Iranlingva interpretado helpis la komencantojn el Irano aktive partopreni la diskutojn.

Estis detale preparolitaj la problemoj kaj substrekitaj la sukcesfaktoroj de lingvoinstruado. Aparta atento estis dediĉita al Esperanto kulturo kaj celoj kaj rezultoj de Esperanto instruado. Ĉi-rilate interesajn prelegojn prezentis Reza Torabi (Esperanto-kulturo) kaj

Gian Piero Savio (Etna humuro).

La lernejoj ne nur okupiĝis pri serioza lernado, sed ankaŭ havis eblecon uzi siajn sciojn dum la ekskursoj kaj amuzaj vesperoj. Gustumado de naciaj manĝaĵoj, aŭskultado de naciaj kantoj, partopreno en tradiciaj ceremonioj, konatiĝo kun naciaj kulturaj valoroj — ĉio tio helpis ne nur kompreni la nacian karakteron kaj la originon de kulturaj diversecoj, sed ankaŭ trovi multon komunan en tiu “diverseco”.

En la infana ripozejo Gugark ĉiuj por momento forgesis pri sia aĝo kaj revenis en sian helan infanecon. Ĉi tie okazis ankaŭ Lingva Festivalo, dum kiu iranano Morteza Habibpoor prezentis la internacian lingvon kaj instruis kelkajn Esperantajn vortojn kaj frazojn, kiujn ĉiuj infanoj ĥore ripetis.

En Gugark kaj poste en Erevan okazis kunsidoj de ILEI, dum kiuj estis diskutataj demandoj de disvastigado de ILEI kaj plifortigado de kunlaboro de KAEM en la regiono, organizado de ILEI sekcio en Armenio. Pluaj laboroj en tiu direkto estos farataj kunlabore kun Iranaj Esperantistoj sub gvidado de Reza Torabi.

Karine Arakeljan

ARKONES 22

Artaj Konfrontoj en Esperanto

29 sep – 1 okt 2006
denove en Poznań (Pollando)

www.arkones.republika.pl

“La Ondo” rekomendas.

Litovio respondis adekvate

Dum kelkaj lastaj jaroj ambasadorino de Belgio en Litovio estis esperantistino Marie-Louise Vanherk. 10 aŭg 2006 prezidento de Litovio Valdas Adamkus nomumis Nijole Zambaitė ambasadorino de Litovio en Belgio.

Ankaŭ Nijole Zambaitė estas esperantistino. Dum 1970–1980 ŝi aktive agis en Vilna junulara Esperanto-klubo *Juneco*. Post la sendependiĝo de Litovio ŝi dum kelkaj jaroj laboris en litoviaj ambasadoj en Londono kaj Vaŝingtono kiel ekonomia ataŝeo, ofice en la ministerio de eksterlandaj aferoj de Litovio. Dum 2004–2005 ŝi estis konsilantino de la Litovia prezidento pri ekonomia strategio. Dum 2005–2006 ŝi estis direktorino de departemento pri politiko de ekonomia sekureco de ministerio de eksterlandaj aferoj.

Povilas Jegorovas

Ambasada akcepto

12 jul 2006 ambasadoro de Italio en Litovio Giulio Prigioni en sia nova rezidejo en Vilno akceptis grupon de litoviaj aliĝintoj al la 91a UK en Florenco.

En la akcepto partoprenis pli ol 40 esperantistoj (entute al UK aliĝis 58 personoj, sed ne ĉiuj povis partopreni la akcepton). Partoprenis ambasadorino de Belgio en Litovio, esperantistino Marie-Louise Vanherk, kiu finas sian deĵorperiodon en Litovio kaj baldaŭ forveturos al Peruo. Ĉeestis kelkaj ĵurnalistoj. La ambasadoro salutis ĉiujn venintojn kaj en tre glata Esperanto tralegis sian paroladeton.

En sia respondeca parolado prezidanto de LitEA, Povilas Jegorovas menciis ekzemplojn de kunlaboro inter litovaj kaj italaj esperantistoj (presado de 40 libroj de Edistudio en Kaŭno, eldono de du libroj tradukitaj el la itala al litova lingvo, kies eldonon financis Itala-Litova fondaĵo: *La serĉado de perfekta lingvo en Eŭropa kulturo* de Umberto Eco kaj *Unu voĉo por la tuta mondo* de Vitaliano Lamberti) kaj donacis al la ambasadoro du librojn en la itala lingvo, kiuj estis presitaj en Kaŭno antaŭ dek jaroj: *La lingua pericolosa* de Ulrich Lins kaj *Il nuovo realismo* de Bruno Vogelmann.

Sekvis regalo per diversaj trinkaĵoj kaj manĝaĵoj. Vasta publikaĵo pri la evento aperis en la tutlanda tagĵurnalo *Lietuvos aidas*.

Povilas Jegorovas

Sukcesa ekspozicio

De 10 jun ĝis 1 jul 2006 en la publika biblioteko de Kortrijk (Belgio), okazis ekspozicio pri la grava kolekto de Esperanto-libroj kaj -revuoj, kiun ĉi tiu biblioteko gastigas. Kvankam la ekspozicio ne estis granda, ĝi estis konsiderata interesa kaj venis multaj pozitivaj reagoj.

Dum la ekspozicio okazis kelkaj prelegoj, kies tekstoj legeblas je http://www.geocities.com/esperanto_kortrijk/bonvenon.html.

Post la fermo la organizintoj kunvenis por interŝanĝi opiniojn pri la okazinta ekspozicio kaj por pripensi la estontan agadon de la kolekto. La komenca plano fari katalogon de la ekspozicio ne realiĝis, sed restas la intenco daŭre disponigi al la publiko la montritajn erojn per broŝuro kaj/aŭ retpaĝo.



Ankoraŭ dum longa tempo la ĉefa tasko de la skipo da volontuloj restos la registrado kaj ordigado de la venanta materialo. Tamen estas firma deziro valorigi la multajn duoblaĵojn (precipe revuojn) per kreota interŝanĝa sistemo kun aliaj bibliotekoj kaj kolektantoj. Precipe interesa estus interŝanĝo de revuoj kontraŭ nove aperintaj libroj, kiuj pliriĉigu la kolekton. Por interŝanĝoj ankaŭ uzeblus modernaj teknikoj, ekzemple skanaĵoj sendataj rete.

Atendante la realigon de tia interŝanĝejo, la fondaĵo jam nun sciigas ke ĝi ege ŝatus akiri la numeron de novembro 1992 de *Bulgara Esperantisto* (aŭ eventuale konfirmon ke tiu numero ne aperis).

Roland Rotsaert

La Civito kreskas

21 jul 2006 la **Senato** de la Esperanta Civito kunsidis lastfoje en sia unua mandato, en la urbodomo de Loklo.

La Senato aprobis la leĝojn pri la Lingva Komitato de Esperantio (lex academica) kaj pri la simbolo por la unua helpo (lex crystallina). La Senato aŭskultis la raporton de sen. Rooke, kunordiganto de la esplorkomisiono pri la familia juro. La debato konstatis ke la komisiono povis nur parte plenumi siajn taskojn, sed ke nun la parolo estas al la diversaj grupoj: ili indiku siajn proponojn en la programoj kuplotaj al la kandidatlistoj.

La Vickonsulo komunikis ke demisia mesaĝo de sen. Montagner ne estas diskutibla, ĉar necesus subskribita letero kaj ne simpla retmesaĝo. Samtempe li informis, ke la KoKuSo de la Verda Listo anoncis la intencon ne rekandidatiĝi sen-anon Montagner.

La lastan **Forumon** sesion de la mandato 2001–2006 partoprenis delegitoj kaj observantoj de Kultura Centro Esperantista, LF-koop, la redakcioj de *Literatura Foiro*, *Heroldo de Esperanto*, *Debrecena Bulteno*, Esperanta PEN-Centro, Itala Interlingvistika Centro, Esperantista Domo de Kulturo en Razgrado, Societo *Sukceso* en Vraco, Charento Esperanto, Feminisma Esperanta Movado, 22 jul 2006 en Ĉaŭdefono.

Kortuŝa momento estis akcepto de la novaj aliĝpetoj al la Pakto: la dua establo en Afriko (SIPU en Burundio) kaj la dua establo en Latin-Ameriko (Meksika Esperanto-Federacio), kies prezidanto, c-ano Luís Raudón Uribe, ĉeestis kiel oficiala delegito.

En la plej grava mezamerika lando, kaj fakte la plej granda kaj popole plej multnombra el la hispanlingvaj ŝtatoj, situas la unua landa asocio de UEA aliĝinta al la Pakto por la Esperanta Civito. Kune kun Afriko, Latin-Ameriko estas do la mondoparto ekster Eŭropo kie la Pakto ekspansas.

La Forumo aprobis direktivon Muhlemann, per kiu naskiĝas oficiale la LingvoTesta Sistemo de la Esperanta Civito, kiu eble kondukos al didaktika revolucio, kaj certe forte renovigas la lingvoekzamenadon pri esperanto. Pri la nova direktivo aperos gazetara komuniko.

La Forumo esprimis unuanime sian aprezon por la Deklaracio pri la esenco de la afrika esperantismo.

HeKo

Ni lernis kunvivadi

“Lerni kunvivadi” estis la ĉeftemo de la 41a Brazila Kongreso de Esperanto, kiu okazis en Campinas 15–19 jul. Kaj tiu estis la etoso kiu regis dum la tuta evento.

Multe helpis tiun sanan kunvivadon la trafa elekto de la Kongresejo — “Espaço Arcadas”, en la urbocentro de Campinas. Proksime de la enirejo taŭga halo, kun pluraj standoj de diversaj organizaĵoj, arigis la kongresanojn en agrablaj interparoloj kaj profitdonaj interŝanĝoj de ideoj kaj spertoj. En apuda ĉambro la libroservo de BEL ofertis librojn kaj aŭdvidajn materialojn. Najbare, la sekretario de la kongreso.

Tamen ne nur tiaj aferoj allogis 400 gekongresanojn, kiuj venis el pluraj partoj de Brazilo kaj el sep aliaj landoj.

Interesaj prelegoj, utilaj fakaj labor-kunsidoj, kursoj, porjunulara programo (en la sino de la 26a Brazila Junulara Kongreso de Esperanto), ĉarma infankongreseto, asembleo de BEL, projekciado de filmoj parolataj aŭ kun subtekstoj en Esperanto... Ĉar ne estis eble al mi ĉeesti ĉiujn eventojn, mi elstarigu, ekzemple, kelkajn prelegojn al kiuj mi sukcesis iri:

- La tradukarto de Porto Carreiro Neto (Florianio Pessoa);
- La sono de simfonia orkestro (Alfredo Aragon);
- Kial Machado de Assis? (Paulo Sergio Viana);
- Telepatio: fakto aŭ fantazio (Francisco Stefano Wechsler);
- La patro de Hodler (Pedro Cavalheiro);
- Rakonti per bildoj (Joe Bazilio);
- *Suda Stelaro*, plukitaj faktoj el la historio de la pionira E-Klubo de Brazilo (James Piton).

Elstaraj estis la artaj horoj: Muzikumo kun JoMo (franca muzikisto kaj kantisto), prezentado de la argentina artisto Alejandro Cossavella, prezentado muzika kaj poezia de Neide Barros Rego, prezentado de poeto, komponisto kaj kantisto Tarcisio Lima, prezentado de repisto Antonio Moreira Filho, debuto de la grupo *Supernova* kaj de la arta talento de Jose Lunazzi.

Krome menciindas la tutmonda lanĉo de la filmo *Gerda malaperis*, produktita de *Imagu Filmo* kaj de la libro *Postmortaj rememoroj de Bras Cubas* de Machado de Assis (traduko de Paulo Sergio Viana) fare de la eldonejo *Oportuno*.

Aloísio Sartorato



Esperanto-kurso en Tajvano (Fotis Reza Kheirkhah)

En la dua granda urbo de Tajvano

9 jul 2006 post multaj jaroj da atendo estis realigita Esperanto-kunveno en Kaohsiung (Gaushon), granda havena urbo en la sudo de Tajvano. Venis homoj el tiu urbo kaj ĉirkaŭe (ĉefe el Ping Tung) por diskuti progresigon de la Movado tie. Kunvenis 23 personoj de aĝo 12 ĝis 62 jaroj — 15 esperantistoj kaj 8 neesperantistoj.

Nun en Kaohsiung estas du kursoj de Esperanto kun 12 studentoj, ĉefe lernejoj. La iniciatinto de la kursoj estas f-ino Klementino Lin. Ŝi antaŭ du monatoj konatiĝis kun Esperanto kaj tuj kaptis ĝiajn esencon kaj signifon, kaj nun ŝi faras kursojn en sia lingva lernejo. Ŝi nun estas tradukanta lernolibron de Esperanto por Tajvananoj kaj decidas divers-kampe agadi por Esperanto. Ŝi jam aŝiŝis informojn pri Esperanto kaj volas malfermi pliajn kursojn. Cetere, ŝi kaj ŝiaj du lernantinoj triope aliĝis al UEA, kies membroj en Tajvano estas malpli multaj ol fingroj de unu mano! Kaj ŝi jam aĉetis Esperanto-librojn kaj abonis al *Juna Amiko*.

Se vi volas kuraĝigi ŝin, bv sendi gratul-mesaĝojn al ŝi aŭ korespond-petojn al ŝiaj lernantoj kaj Esperantaj librojn por ŝia malgranda Esperanto-biblioteko en la lernejo.

✉ clement_studio@yahoo.com

Reza Kheirkhah

Valamo: la plej internacia

La ĉi-jara Esperanto-kurso en Valamo (3–7 jul), la sepa sinsekve, estis ĝis nun la plej internacia. De la kursanoj 2 venis el Francio, 1 el Svedio, 5 el Finnlando kaj 4 el Ĉinio. La ĉefinstruisto estis denove Atilio Orellana Rojas el Argentino/Nederlando. Kiel kurso-

gvidanto kaj helpinstruisto agis ankaŭ ĉi-jare Tiina Oittinen. Ĉiuj kursanoj jam havis iujn bazajn sciojn pri Esperanto. Ili dividiĝis en du grupojn laŭ lingvosocioj kaj interesoj.

La kursosemajno komenciĝis alimaniere ol kutime, ĉar el la regiona televida kanalo venis redaktoroj por fari mallongan raporton en regionaj novaĵoj. Ili filmis kaj la instruadon kaj la konatiĝan rondiradon, kiun ĉiĉeronis Esperante Jukka Laaksonen. Krome la instruistoj kaj kursanoj estis intervjuitaj.

Dum la libertempo ni krosis surŝipe en la lago Juojarvi, migris al la kruco de la migranto kaj vizitis la monaĥejan tombejon. Merkrede ni ekskursis al fumsaŭno kaj jaŭde havis festan vespermanĝon laŭ Valamo-stilo. Unu el niaj ĉinaj partoprenantinoj prezentis kanton dum la festa vespero, aliaj programeroj estis teatraĵeto kaj muzikado.

La kursanoj informiĝis pri eventoj de Esperantio kaj estis bonvenigitaj al la venontjara Festivalo *Arta Lumo* en Kuopio. Venontjara kurso okazos 23–27 jul kun la samaj ĉefinstruistoj kaj kursogvidanto. Lige al *Arta Lumo* estos aranĝita antaŭekskurso al Valamo 26–27 jul. Al la ekskursi programo apartenos la festa vespermanĝo laŭ Valamo-stilo, konatiĝo en la monaĥeja areo kaj komuna ŝipvojaĝo el Heinavesi al Kuopio.

Tiina Oittinen





La Sukcena Vojo

La Sukcena Vojo

Kadre de Slovacia Esperanta Federacio (SKEF) aktivas sekcio de vojaĝantoj. Estas konataj jam realigitaj projektoj de la sekcio: biciklado laŭ Danubo, ĉiujara turisma renkontiĝo “Ekkonu Altajn Tatroj”, piedturisma “Dek du monatoj — dek du montopintoj”, kaj “Sovaĝaj flosadoj”.

La partoprenantoj de la nova biciklista projekto *Sukcena Vojo* planas trabcikli landojn inter la Balta kaj Adria maroj. La projekto komenciĝis en 2004. Tiam ni biciklis de la slovaka urbo Žilina, laŭlonge de Vistulo, ĝis Varsovio. Ĉi tie komenciĝis la dua etapo en 2005, kiu denove kondukis laŭlonge de Vistulo ĝis la Balta Maro en la urbo Frombork. Por 2006 ni planis la trian etapon de Frombork tra ĉebaltaj landoj ĝis Talino (Estonio).

Sed la tria etapo komenciĝis malsukcese. Inter Slovakio kaj Frombork ni uzis aŭtomobilon por transporto de la partoprenantoj, bicikloj kaj ekipaĵo. La vojaĝo komenciĝis 30 jun 2006, vendrede. En tiu tago komenciĝis somera feria periodo, kaj tre malbonajn polajn vojojn plenŝtopis rapidaj aŭtomobiloj. Nokte, 112 km norde de Varsovio saltis en nian vojon granda alko. Ĝi tute disrompis nian aŭtomobilon kaj mem mortis. Por ni komenciĝis komplika tempo: ceremonioj kun policanoj, komplika transportado de la frakasita aŭtomobilo en Varsovion kaj poste en Slovakion. Tamen danke al fortaj nervoj post tri tagoj ni decidis daŭrigi la vojaĝon laŭ nova plano.

De Varsovio ĝis la urbo Mamonovo en Kaliningrada regiono (Ruslando) ni vojaĝis per trajno. De Mamonovo ni biciklis en Kaliningradon. Ĉi tie por ni

preparis agrablan programon lokaj esperantistoj Halina Gorecka kaj Nikolaj Penĉukov. En la ĝardeno de la familio Penĉukov ni konstruis tendaron. Halina montris al ni Kaliningradon. Kompreneble ni vizitis la tombon de la filozofo Kantio. Sub la gvido de Nikolaj ni trarigardis la muzeon de sukceso kaj sovetunian armean submarŝipon E-443, admirante la konstruintojn de la fera grandegaĵo.

Post dutaga restado en Kaliningrado ni, kune kun Aleksej Korĵenkov, biciklis el Kaliningrado al la Kurŝa Terlango, preskaŭ egale dividita inter Ruslando kaj Litovio. Ambaŭflanke estas naciaj parkoj. Sur la tuta ruslanda teritorio estas belaj arbaroj kaj pitoreskaj strandoj. La somero estis ekstrema varma ankaŭ en tiu ĉi parto de Eŭropo, kaj la baltaj strandoj montriĝis pli belaj ol tiuj kiuj situas ĉirkaŭ sudaj maroj. Naĝi en vespera maro post longa vojo dum sunsubiro estis romantike, kaj la homoj sentis kiel iliaj animoj pleniĝas per boneco kaj feliĉo. Sekvutage ni, krom aliajn interesaĵojn, vizitis la vilaĝon Rybaĉij, kie ni manĝis fumaĵitajn fiŝojn kun la rusa biero *Siberia Krono*. Nin surprizis la vilaĝa kulturdomo kun interesaj ekspozicioj kaj kulture aktivaj vilaĝanoj. Krom unu partoprenanto ĉiuj estis unuafoje en Ruslando. Ili konstatis, ke Ruslando havas alian karakteron kompare kun la landoj de la Meza Eŭropo. Granda problemo ĉi tie estas malpureco, sed la homoj estas tre bonaj kaj gastamaj. El la altaĵo Efa, kiu estas la plej alta duno, ni trarigardis belecon de la Terlango kun sablaj dunoj kaj arbaroj. Varmega tago kun sablaj montoj revokis impreson, ke mi estas ie en Afriko. Antaŭ la altaĵo estas “Dancanta arbaro”.

Trairinte la landlimon post la vilaĝo Morskoje ni troviĝis en alia mondo. En ĉi tiu parto de Litovio estas forta turisma trafiko: multaj homoj, hoteloj, privataj vilaoj, restoracioj, diversaj atrakcioj kaj bone markitaj biciklovojoj. Ĝis Smiltynė kondukas biciklovojo inter belegaĵoj, naturaj interesaĵoj kaj laŭlonge de bela marbordo. Perturba aperiaĵo estas kondukilo de elektra altensio en la nacia parko. Smiltynė krakis de multaj vizitantoj. Longaj viroj antaŭ mara akvario kaj oceana muzeo decidigis nin viziti muzeon de litova kamparo kaj ekspozicion de ŝipoj.

Per pramo ni venis en la marhavenan urbon Klaipėda. Pro manko de la tempo, kiun ni perdis en Varsovio, ni komencis revenadi. Plua celo de nia biciklado estis Nemano. Ĉi tiun imponan riveron ni trarigardis de la delto ĉe la urbo Ŝilutė ĝis la urbo Jurbarkas. En Jurbarkas ni turniĝis suden kaj tra la urboj Marijampolė kaj Kalvarija ni biciklis en polan urbon Suwałki, de kie ni per trajno revenis en Slovakion.

Jano Vajs

Ekotur: de nun bicikle kaj piede

Tradiciaj ekoturismaj aranĝoj en Ĉeĥio *Ibire* (Internacia biciklista renkontiĝo) kaj *Ekotur* (Ekoturisma renkontiĝo por piedturistoj) estis aranĝitaj ĉi-jare 2–8 jul komune, sub la titolo *Ekotur*.

El iom pli ol dudeko da partoprenantoj el 4 landoj (Belgio, Ĉeĥio, Germanio, Pollando) proksimume duono biciklis, kaj la dua duono migris tra la pejzaĝo de naturprotektita regiono Bohemia Karsto. Vespere ambaŭ grupoj komune esperantumis: prelegoj kaj diskutoj celis precipe (sed ne nur) ekologion, ekoturismon kaj diversajn, per naturo interesajn regionojn en la landoj, el kiuj devenis la partoprenantoj.

Unu tagon oni dediĉis al la proksima ĉefurbo Prago, kie ĝiaj nekonatoj esploris la historian kernon, dum la plejparto migris tra la naturprotektita regiono ene de Prago “Sovaĝa Ŝaro” kun sekva ripozo en la lago Džbán. La fenomeno, ke en Prago troviĝas ne nur valoraj historiaĵoj, sed ankaŭ belega protektita naturo, restas al eksterlandaj turistoj kutime kaŝita, sed ne al la partoprenantoj de *Ekotur*.

Venonta *Ekotur*, denove komuna por biciklantoj kaj piedmigrantoj, okazos inter 30 jun kaj 7 jul en Radožov apud Karlovy Vary.

Petro Chrdle



Ĉu Esperanton dum 3 tagoj? Jes!

Originalan agadon en Kievo, la ĉefurbo de Ukrainio, okazigis Vladimir Soroka, la aŭtoro de la ekspresa kurso *Septima, aŭ studado de Esperanto dum 7 tagoj*.

Li instruis Esperanton al grupo da eksterlandanoj laŭ sia metodo, reduktinte ĝian bazan septagan studo-daŭron ĝis tri tagoj. Soroka proponis partopreni en sia kurso al grupeto da pilgrimantoj, kiujn li renkontis sur la ĉefplaco de Kievo — Placo de Sendependeco. Kvin pilgrimantoj el diversaj mondopartoj konsentis aliĝi al la eksterordinara kurso.

Ekde vendredo ĝis dimanĉo (28–30 jul) Vladimir instruis ilin per parola trejnado nur en Esperanto, sen traduko. La eksperimenton observis UEA-delegito por Kievo, Mikaelo Lineckij.

31 jul 2006 li prezentis en gazetara konferenco la rezulton de la internacia lingva eksperimento *Esperanton dum 3 tagoj — interkomunikigu facile!* Soroka demonstris al la ĵurnalistoj la lingvan nivelon senpere. Ĉiuj dezirantoj povis demandi la studintojn, kiuj senprobleme respondis en Esperanto.

(Laŭ *Nun en Ukrainio*)

IZo: Fine de la lernojaroj

La rezulto de Instituto Zamenhof (IZo) ĉe la jarfina ekzameno 2006 de CEG (Kolegio) tiom mirigas homojn, ke ili volas koni la lernejon. Kantistoj kaj ĵurnalistoj kontaktas IZon por reklami ĝin. Lernejoj proponas kunlaboron. En la lasta semajno de la lerneja jaro IZo povis enkadrigi tiujn proponojn en la celebrado de la jarfina festo.

4 jul okazis futbalmatĉo. Lernejoj najbaraj deziris ludi kontraŭ IZo, sed tiu ĉi preferis ludigi siajn instruistojn kaj gelernantojn. Rezulto: unu kontraŭ unu.

Sekvatage IZo gastigis koncerton. Kvar kantistoj kaj programanimanto en la radiostacio de Lome agrabligis la etoson. La enkonduko, komentarioj kaj taksadoj de la renoma programanimanto Tony Be Cool donis apartan aromon al la evento. Dum kvar horoj tondradis en Instituto Zamenhof. La tuta kvartalo bolis.

6 jul de la mateno okazis dancado, manĝado kaj ludoj. Sekvis tamtamludo de lernantoj de la elementa nivelo de IZo. Ne mankis teatraĵetoj de la gelernantoj de CEG-nivelo. La gelernantoj de la lasta klaso de CEG, kiuj ĵus sukcesis la jarfinan ekzamenon, prezentis dancon. Dume staris ilia foto sur la tablo honora. Posttagmeze oni proklamis la rezulton de la aliaj klasoj. Ĝenerale la sukceso proksimas al 90%. La plej bonaj gelernantoj ricevis premiojn — lernilojn kaj stipendiojn. “Instituto Zamenhof, ĉiam supren” kriadis gelernantoj kaj eĉ gepatroj. Estis malfacile haltigi la ceremonion, tamen ĉio devis ĉesi. Gepatroj impetis al la instruistoj de IZo por peti lokon al siaj gefiloj.

Ĉu ne estas nun tro frue akcepti novajn gelernantojn? Ĉe la fermo de la koncerto Tony Be Cool konsilis: “Homoj invados la lernejon kun ĉiaj paperoj por serĉi lokon... Neniam akceptu gelernantojn trans la kapacito de viaj klasĉambroj. Kiam la nombro ne estas tro granda, la laboro estas pli zorge farata. Plian sukceson ĝis ducentprocente”.

Gbeglo Koffi

Unufraze

★ La komitato de UEA akceptis du novajn landajn asociojn (Malagasio k Nepalo) k starigis kunlaborajn kontraktojn kun *Eŭropo-Demokratio-Esperanto* k rondo *Kato*; Umberto Broccatelli el Italio k Ottó Haszpra el Hungario iĝis honoraj membroj de UEA. (*Florenca Lilio*)

★ La estraro de UEA aljuĝis la premion Deguchi (ĉ. 2 mil eŭroj), al Simo Milojević, eksfocisto de UEA. (*Libera Folio*)

★ En la 39a Konferenco de ILEI (Parmo, julio 2006) estis elektita nova estraro de ILEI: Radojica Petrović (prezidanto), Atilio Orellana Rojas (sekretario), Sjerd Bosga (kasisto), Aida Čižkaitė (konferencoj, scienca agado), Zsófia Kóródy (E-centroj, instrukapbligado, ekzamenoj), Yas Kawamura (azia agado), Miahai Trifoi (lerneja agado). (ILEI)

★ 4-persona E-delegacio 17 jul prezentis en Bruselo al la Eŭropa Komisiono projekton de Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en ok aziaj landoj por 30 studentoj je valoro de 100 mil eŭroj. (A.Grzebowski)

★ LitEA donacis al la ĉefa litovia biblioteko Martynas Mazvydas po 3 ekz-oj de 27 E-libroj eldonitaj en Litovio, ĉiujn eldonaĵojn de la 90a UK, kvar kolektojn de *Vilna Sonoro*, tri videofilmojn, 16 bildkartojn, 11 kovertojn, 7 invitilojn, 5 vizitkartojn, 3 afiŝojn. (P.Jegorovas)

★ Okaze de la 50-jara jubileo de la E-Organizaĵo en Zajeĉar 2 jun 2006 okazis intervjuoj kun e-istoj ĉe Radio Zajeĉar k ĉe TV Zajeĉar; samtage la loka ĵurnalo *Timok* aperigis tri artikolojn pri Eo. (Landa Agado)

★ 27 jun Japana E-Instituto (JEI) eldonis 3 mil ekz-ojn de 1352-paĝa E-Japana Vortaro, redaktita dum 15 jaroj de 10-kapa komisiono sub gvido de Konisi Gaku; ĝi enhavas 43814 kapvortojn. (Landa Agado)

★ En la publika biblioteko de la finnlanda urbo Somero estas 1000 libroj k aliaj eroj en Eo. (*Esperanta Finnlando*)

★ La eldonkvanto de *Kataluna Esperantisto* estas altigita de 300 al 400 ekz-oj por sendi ĝin al urbaj, lingvolernejoj k universitataj bibliotekoj de Kataluna Lando, ankaŭ al kulturaj k sindikataj organizoj. (*Kataluna Esperantisto*)

★ La plenum-komitato de SAT, konsiderinte la malbonan financon staton de la asocio, anoncis monkolektan kampanjon por garantii salajron al la sola oficisto de SAT, Kreŝimir Barkoviĉ; post lia emeritiĝo (marto 2009) SAT funkcios surbaze de volontula laboro. (*Sennaciulo*)



Irlando ne petis oficialan statuson por la irlandaj lingvoj en 1971, kiam ĝi aliĝis al la Eŭropa Komunumo.

La irlandaj oficialiĝas

(Vide el Bruselo) Kiam Irlando aliĝis al la Eŭropa Unio en 1971, ĝiaj ministroj “forĝesis” peti oficialan statuson por la irlandaj lingvoj, verŝajne sub la premo de la eŭropa organizaĵo eĉ tiam konscia pri tradukokostoj. Ĝis la unua de januaro 2007 la irlandaj lingvoj estas “traktatlingvoj” — duoficiala statuso dividita kun la luksemburga. Tio signifas, ke traktatoj estis tradukitaj al la du lingvoj kaj civitanoj povis skribi peti kaj ricevi informojn propralingve.

Fine de 2004 Irlando komencis peti plene oficialan statuson kaj ekde la unua de januaro la gaela lingvo, “flue” parolata de inter 80 kaj 300 mil personoj depende de starpunkto, ĝuas la samajn rajtojn aŭ privilegiojn kiel la aliaj 20 oficialaj lingvoj.

“La registaro multe laboris por ekhavi oficialan kaj laboran statuson por nia nacia lingvo. Spite al lasttempa skeptiko de certaj homoj, ke la necesaj postenoj ne estos plenumitaj, nun klaras ke ekzistas forta deziro por tiuj tre allogaj kaj interesaj laboroj. Tio alportos la irlandan al la institucioj de Eŭropo”, — diris Ministro pri Eŭropaj aferoj Noel Treacy.

Komence de junio la Komisiono fermis alvokon por 30 tradukistoj de la irlandaj lingvoj. Laŭ la registaro, ĉio bonas kaj ne estos problemoj en la venonta jaro. “Mi estas ege kontenta pro la tre forta intereso pri tiuj gravegaj postenoj, kiuj estos tiom esencaj en la promocio de nia lingvo sur la sceno eŭropa”, — diris Treacy.

Iomete alia estas la opinio de opoziciaj partioj kaj observantoj en Bruselo. Por eviti tro da negativaj efikoj en la amaskomunikiloj, la ĝenerala sekretario de la Eŭropa Parlamento prezentis siajn planojn antaŭ la somerpaŭzo. Laŭ la propono, nur la fina teksto de reguloj estos tradukitaj irlandan, kaj tiuj, kiuj volas paroli irlande devos antaŭanonci sin. Pli signifas por la malmultaj homoj, kiuj parolas la lingvon, aŭ havas intereson en la laboro de la Parlamento, la irlandaj lingvoj ne estos uzitaj, laŭ la propono, por “ĉiutaga uzo”, t.e. en broŝuroj, publikaĵoj, gazetaraj renkontiĝoj, ttt-ejoj kaj por labordokumentoj.

“Kiel ofte okazas kun tiaj aferoj, tia politike senteblo dokumento estis proponita ĝuste antaŭ la somerpaŭzo, kiam EU-oficistoj antaŭvidas pli malfortan reagon”, diras EP-ano Bairbre de Brún. “Mi forte oponas ĉiujn provojn malsuprenigi la statuson de la irlandaj lingvoj en EU”.

La oficialigo de la irlandaj lingvoj en la Eŭropa Parlamento jare kostos inter 100 kaj 677 mil eŭroj por unu flua irlandaj lingvoparolanto en la Parlamento. Ekde la 15a de januaro 2007, kiam komenciĝos la unua venontjara plenkunsido de la Parlamento, eble nur kvin politikistoj uzos la novajn interpretservojn. Pro manko de interpretistoj estos aŭditaj nur skribitaj paroladoj, sed ne buŝaj komentoj, rimarkoj kaj neskribitaj alparoladoj.

Tamen la sola EP-ano kiu parolas la irlandan kiel sian gepatran lingvon, Seán Ó Neachtain, estas tre kontenta. “Ĝenerale la gajno pro multlingveco kaj kultura diverseco estas multe pli granda ol la kostoj”, — Ó Neachtain diris al Brusela novaĵservo *Eupolitix*. — “Ekzistas nova sento en la irlandaj lingvoj. Ĝi estas simbolo de la popolo, pli ligita al identeco ol al komunikado”.

Tamen Bairbre de Brún agnoskas problemojn. “Mi agnoskas, ke aldono de ĉiu oficiala kaj labora lingvo alportas problemojn en la komenco. Post la pligrandiĝo de EU en 2004, naŭ novaj lingvoj estis aldonitaj kiel oficialaj lingvoj. Tio alportis multan laboron por sekurigi konformecon. Tamen post legado de la raporto de la ĝenerala sekretario, klaras ke li metas tre malaltajn postulojn, kiujn la Parlamento eventuale iam provos atingi”.

Dafydd ab Iago

Pro tio ke mi nun oficiale uzas nur la kimran version de mia nomo, Dafydd ab Iago, mi ne plu uzos mian duonkimran-esperantlingvan nomon Dafydd ap Fergus.

Jubileo: 50 pakaĵoj dum 5 jaroj

14 jul 2006 feste al la kvinjariĝo de la kampanjo “Esperanto en la bibliotekojn”, iniciatita de Kultura Kooperativo de Esperantistoj en julio 2001, estis ekspedita la 50a libro-pakaĵo de tiu kampanjo al la Biblioteko de *Real Gabinete Português de Leitura* en Rio de Janeiro. La pakaĵo enhavis 11 librojn en/pri Esperanto.

Ekde la komenco de la kampanjo estis donacitaj pli ol 500 ekzempleroj da libroj al 40 brazilaj kaj 10 alilandaj bibliotekoj. Ĝi estas subtenata de libervolaj mondonacoj de deko da brazilaj esperantistoj.

Aloísio Sartorato

Leterkesto

Por mi jam antaŭe estis interese legi pri la historio de la Sukcena Lando. Tamen mia ĉi-somera vojaĝo en Mazurio-Varmio faris ĝin ankoraŭ multe pli viva kaj interesa. Mi povis proprakule surloke vidi kaj konstati la grandegon kaj potencon de la Malborka kastelo kaj promeni sur la malnovaj kaj belaj stratoj de la urbo Toruń. Ambaŭ menciitaj urboj ja estis signifaj ĝuste tiutempe pri kio skribas Halina en la sepa parto de sia valora historia serio, kiu serio laŭ mi donas al via magazino bezonatan historian fonon aŭ profundecon.

Bruno Lehtinen (Finnlando)

En *La Ondo* de julio 2006 (pĝ. 10) troviĝas aserto de *HeKo* pri interparolo kun la germana “ministro pri kulturo”. La prezentitaj detaloj estas malĝustaj. La kancelierino ne havas ministron kun la nomo Michael Naumann. Ŝia “ŝtata ministro pri kulturo” nomiĝas Bernd Neumann. Li servas de novembro 2005. Michael Naumann servis en la antaŭa registaro, nome sub Gerhard Schröder, kaj eksiĝis jam en januaro 2001.

Ulrich Lins (Germanio)

Demokration sen burokratio

Laŭ diversaj gradoj, la Naŭa de Aŭgusto en Bulonjo-ĉe-Marŝo signis la aprobon pri la ĉefaj simboloj de nia lingvokomunumo: la Libro, la Flago, la Himno.

Por la raŭmistoj, la Deko de Aŭgusto en Ĉaŭdefono estas, ideale kaj nature, la Tago tuj post la Bulonja. La Pakto por la Esperanta Civito en 1998 relanĉis la spiriton de 1905, la spiriton kiu ne videblas en la Bulonja Deklaracio mem, sed kiu vivis plene en la unua Universala Kongreso.

Tial nature la penso iras al tiu konkreta manifestiĝo pri la esperanta identeco, kiuj estis la pioniraj UKoj. Aldone, al ilia demokratia spirito, ĉu rekta (ĝis inkluzive 1910) ĉu reprezenta (bazita sur la deleĝoj de lokaj societoj) ĝis 1922, kiam la kontrakto de Helsinko kreis kupolon pli kaj pli izolotan de la popolo, meze de la kreskanta diverĝo kun la laborista movado.

Kaj la penso iras ankaŭ al tiu paragrafo de la Manifesto de Raŭmo kiu parolas pri la kongresoj “kiel vojo al kresko”.

Ĉu tiuj pensoj kongruas kun la nuntempaj UKoj? Bedaŭrinde ne. La Universala Kongreso hodiaŭ estas nek modelo de demokratia vivo, nek momento de vere kvalita kresko, nek realigo de homarana Esperantujo.

La bezono de demokratio, kies ĉefa karakterizo estas la kapablo kunlaborigi la minoritatajn kaj opoziciajn voĉojn, anstataŭ estingi ilin per marĝenigo (tra ignorado aŭ insultado), estas la esenco de la Pakto celanta konstrui la Esperantan Civiton.

Sed starigi la Civiton signifas ankaŭ altigi la kvalitan kaj kulturalan nivelon de la esperantistaro. Alporti la fonton de la klereco al tiuj kiuj soifas je kleriĝo. Tion la Pakto stimulas kaj faciligas, kiel okazas inter paktintaj establoj en Eŭropo kaj aliaj paktintoj en Afriko.

Mi aparte ĝojas ke el Venezuelo kaj Meksiko, sed ankaŭ Argentino kaj Brazilo, do el Latin-Ameriko, venas tre kuraĝigaj signaloj. La aliĝo al la Pakto fare de Meksika Esperanto-Federacio pruvas ke la landaj asocioj estas pli maturaj ol certaj gvidantoj kaj burokratoj en Eŭropo.

Baldaŭ aliaj landaj kaj regionaj societoj petos la aliĝon al la Pakto. Ĉiuj estos bonvenaj, por konstrui kune la novan Esperantion, la demokration sen burokratio.

Prof. d-ro habil. **Walter Ŝelazny**
Konsulo de la Esperanta Civito

Italaj socialistoj por Esperanto

(HeKo) La Socialista Junulara Federacio (FGS), kuplita al la partio “Rozo en la Pugno” (socialistoj de Prodi kaj radikaluloj de Pannella) aprobis deklaron en sia nacia kongreso (Tivoli, 8–9 jul 2006), laŭ kiu oni subtenas:

a) la tujan forigon de la trudo elekti la anglan lingvon kiel ununuran unuan fremdan lingvon, kion en Italujo enkondukis la lerneĵ-reformo de la Berlusconi-registaro;

b) leĝoproponon por la enigo de Esperanto inter la lingvojn lerneblajn kiel duan fremdan lingvon;

c) Eŭrop-skalan eksperimentadon de Esperanto.

Ĉe la aprobo de la deklaro, la ĵus elektita FGS-sekretario, Francesco Mosca, anoncis sian intencon enretigi ankaŭ en Esperanto parton de la prikongresa dokumentaro.

Laŭ Giorgio Pagano de “Esperanto” Radikala Asocio temas pri “plua grava politika paŝo, post tiu kun la Eŭropaj Verduloj en 2002; tiu de la Eŭropa Socia Forumo en 2003; kaj tiu ĉe la Someraj Universitatoj de la Francaj radikaluloj en 2003 kaj 2004”.

Salutvortoj de la nova TEJO-prezidanto

Kiel vi eble scias dum la IJK en Sarajevo estis ŝanĝo de prezidanto de TEJO kaj mi volas kiel novelektita prezidanto unue danki Heming pro lia gvidado de TEJO dum la lasta jaro, due danki pro la jam ricevitaj gratuloj kaj trie kapti la okazon prezenti min kaj la ĝeneralajn prioritatojn de TEJO por la venonta jaro (la estraro planas prezenti pli specifan laborplanon dum la fino de septembro).



Pri mi mem, mi naskiĝis en Bergen (Norvegio) sed havas radikojn kaj loĝis en norda kaj centra Eŭropo, Ruslando kaj Usono — do mi vidas min pli kiel eŭropano ol apartenante al iu specifa nacieco (kaj mi ĉiukaze ne estas germano kiel mi kelkloke legis). Nuntempe mi loĝas kaj laboras en Kopenhago verkante mian doktoran tezon pri rusa populara muziko en St.-Peterburgo (kie mi loĝis dum la pasintaj 1½ jaro). Mi enmovadiĝis en 1995/96 kaj aktivis en ĉefe GEJ, Eurokka kaj TEJO, sed ankaŭ iomete en JEFO, USEJ kaj NJE. Mia ĉefa agado estis en (kun)organizado de renkontiĝoj (ISoj, IJKoj kaj UKoj), internaciaj rilatoj kaj dum la lastaj jaroj aktivula trejnado. Ideologie mi estas pragmatikulo kaj mi ne kredas en la fina venko. Mi jes kredas en Esperanto kiel ilo por krei interpopolan komunikadon kaj tiel helpi fari la mondon pli tolerema — en la hodiaŭa mondo tio eble eĉ pli gravas ol antaŭe.

Kiel prioritatoj por TEJO dum tiu ĉi elekta periodo estas videbligi TEJOn kaj ĝian utilon ĉe niaj landaj sekcioj. Mi dum diskutoj rimarkis ke TEJO (denove) estas vidita kiel iu abstrakta organizo iel ligita al IJK, sed krom IJK multaj ne konas kion ni faras. Aldone kiel prioritato ni strebas plibonigi la informfluan kaj kunlaboron inter estraro, komitato kaj landaj sekcioj, trovi novajn aktivulojn kaj trejni ilin kaj daŭrigi la laboron pri akirado de propra oficisto. Mi konscias ke la ideoj ne estas novaj, sed laŭ kion mi observis tio estas kio TEJO nun bezonas.

Sed mi kaj la TEJO-estraro ne kapablas sole agadi, ni dependas de viaj ideoj kaj komentoj. Vi povas komuniki kun ni aŭ retroŝte (prezidanto@TEJO.org) aŭ diskuti kun ni en nia forumo (<http://www.TEJO.org/eo/forum>). Se vi volas teni vin informita pri nia agado, tiam aliĝu al TEJO-aktuale (<http://www.TEJO.org/TEJO-aktuale/>). Nome de la TEJO-estraro mi antaŭĝojas kunlabori kun multaj el vi, kiuj legas tiun ĉi mesaĝon. Nur kune ni povas antaŭenigi TEJO-n kaj tiel krei sanan bazon por la movado!

David-Emil Wickström
prezidanto de TEJO


Ni sendas gratulojn kaj bondezirojn al

Anatolij Ionesov (Uzbekistano), kiu 50-jariĝis la 1an de aŭgusto.

Aleksej Birjuljin (Siberio), kiu atingis sian Oran Jubileon la 9an de aŭgusto.

Walter Ŝelazny (Francio/Pollando), kiu iĝis rektoro de la Supera Altlernejo de Sociaj Sciencoj en Tyczyn.

LOdE



Nova malnova letero de Ludoviko Zamenhof

La libro *Mi estas homo* (MEH) entenas pli ol 70 tekstojn de Zamenhof pri temoj sociaj, religiaj, ideologiaj. Plejparte ili estas teoriaj, sed kelkaj havas praktikan karakteron, ĉar Zamenhof, same kiel en Esperanto, en la sociaj sferoj estis ne nur teoriisto, sed ankaŭ organizanto. Tia estas, inter aliaj, lia letero al biluanoj, verkita 18 nov (30 nov, Gregorie) 1883, kiam la 23-jara Ludoviko estis studento en Varsovio kaj aktivulo en la (pra)cionista movado.

Kvankam ĉi leteron bone konas zamenhofologoj kaj tiuj esperantistoj, kiuj legis la Plenan Verkaron de L.L. Zamenhof (PVZ) eldonitan en Japanio, la nova publikigo ne estas simpla represo. Unuafoje ĝi aperas en fidinda traduko.

Ĉu la antaŭa(j) traduko(j) ne estis fidinda(j)? Nu, ja ne tute fidindaj, ĉar temis pri “tradukitaj tradukoj”.

Ĉi tiu ruslingva letero estis trovita en 1936 en la domo de biluano Ŝlomo Zalman Cukerman en Gedera (Israelo). Ĝia angla traduko aperis en la Tel-Aviva revuo *Zionism* (1980, №2, pĝ. 151–158), sekvis hebrea traduko (Alter Drujanov. *Atestoj el leteroj pri la historio de Ĥibat Cion kaj la setligado de la Lando Israelo*. Volumo 2 / Red. Ŝlamit Laskov. Tel Aviv: Instituto pri esplorado de cionismo, 1985). Ĉar la originala rusa teksto ne estis publikigita, en Esperanto aperis nur du tradukoj de la angla traduko: de William Auld (PVZ, vol. 10, pĝ. 1–7) kaj de David Mager (*Israela Esperantisto*, 1985, №91, pĝ. 2–8).

Ĉe la kompilado de MEH mi konvinkigis, ke, ekzemple, la tradukoj de Adolf Holzhaus el la rusa ne estas bonaj, kaj mi do nove tradukis ambaŭ cionismajn artikolojn de Zamenhof el *Razsvet* (1882) kaj atente redaktis la plur-

foje represitan Holzhausan tradukon de *Hilelismo* (1901). Mi decidis denove traduki ankaŭ la leteron al biluanoj, sed la rusan tekston havis neniun el la kontaktitaj fakuloj. Mi do petis al Josef Ŝemer, leganto de *La Ondo* kaj prezidanto de Esperanto-Ligo en Israelo, ke li retrovu la originalon.

Se mi scius, ke mia peto kaŭzos al Josi horojn da esploroj, foreston de la laborejo, pendoladon inter arkivoj kaj bibliotekoj, kaj renkontiĝojn kun ne ĉiam komprenemaj oficistoj (sed ankaŭ kun la maljuna Ŝlamit Laskov — jes, la vivkunulino de Ĥaim Laskov, la estro de la Ĝenerala Stabo de la Defendarmeo de Israelo), mi verŝajne ne zorgigus lin... Sed Josi “atingis la celon en gloro” kaj finfine retrovis la ruslingvan manuskripton en la arkivo de la Instituto por esplorado de la juda diasporo ĉe la universitato de Tel-Avivo (dokumentaro “Cukerman”, №372) kaj sendis al Kaliningrado fotokopion de la sespaĝa letero. Halina kaj Aleksej, miaj edzino kaj filo, post longa penado sukcesis deĉifri la tekston (vi ja konas la skribmanieron de kuracistoj, krome la 19-jarcenta letero ne ideale konserviĝis), kaj al mi restis nur traduki ĝin, aldoni kelkajn notojn kaj kore danki ĉiujn, kiuj kunlaboris en la projekto.

Verŝajne mi devas aldoni kelkajn frazojn pri la ricevintoj, kies agadon Zamenhof (tute mature, ne junulece) komentis kaj kritikis, do pri biluanoj — ja ne ĉiuj konas la historion de la setlado de Palestino.

BILU estis junulara socialisma grupo de la pracionisma movado Ĥibat Cion (Amo al Ciono). Ĝi estis fondita 21 jan 1882 en la loĝejo de Israel Belkind (1861–1929) en Ĥarjkov (Ukrainio). BILU estas hebrea akronimo de biblia frazo *Bejt Ja’akov Leĥu Venelĥa*

(...domo de Jakob, venu, kaj ni iru”, *Jes* 2: 5).

Biluanoj (biluim) celis starigi en Palestino socialismajn agrikulturajn komunumojn kaj fabrikojn de diverslandaj judoj por setligi la landon. Tio estis nova, ja la antaŭa migrado de judoj al Palestino estis religie motivita (pilgrimi al Palestino kaj poste morti tie estis laŭdinda ago), kaj tiajn “revenintojn” subvenciis la monda juda diasporo, sed la biluanoj intencis vivteni sin per laborado sur la tero de la prapatroj. Poste fondiĝis grupo de BILU en Moskvo. En julio 1882 la unua bilua grupo venis al Palestino, kie la venintoj eklaboris en Mikve Israel. Anoj de la buro de BILU (krom Belkind) iris al Konstantinopolo por trakti kun Turkio.

En novembro Belkind kun kelkaj biluanoj, malkontentaj pri la laborkondiĉoj en Mikve, dungigis ĉe kolonio Riŝon Lecion, fondita ĵus antaŭ la enmigro de la unuaj biluanoj. Baldaŭ reprezentantoj de barono Edmond James de Rothschild (1845–1934) aĉetis preskaŭ la tutan kolonion, kaj konfliktoj daŭris ankaŭ tie, ĝis biluanoj finfine starigis sian propran komunumon en Gedera.

Entute al Palestino venis 59 biluanoj, sed nur kelkaj restis tie ĝis la fino. La projekto fiaskis, sed la vizio pri la laboro kaj vivo en la prapatrujo fariĝis tasko de la baldaŭ fondita politika cionisma movado.

Nun en Gedera, en la domo konstruita en 1886 de biluano Elijahu Sverdlov (kuzo de bolŝevista gvidanto Jakov Sverdlov), funkcias muzeo de BILU. Konservigis ankaŭ la antaŭdoma sonorilo, kiu avertis laborantajn biluanojn pri atakoj de araboj kaj aliaj danĝeroj.

Aleksander Korĵenkov

Karaj sinjoroj!

Pardonu min pro tio, ke mi tiel longe ne respondis vian leteron: lastatempe mi estis ege okupata kaj, ĉefe, mi havis multajn klopodojn kaj ne povis trovi eĉ unu trankvilan minuton por respondi vian leteron. Nun mi estas denove trankvila, mi povas iom ripozi kaj kun plezuro mi prenas mian plumon por iom interparoli kun vi.

La ricevo de via letero tre plezurigis min: tiam mi sentis tion, kion sentas ekzilito, ricevanta leteron el sia malproksima patrujo, mi ĝuis la belegan aspekton de la karaj lokoj, bildigitaj sur via sigelo¹, — sed ve, la enhavo de via letero tute ne kontentigis min. Antaŭ ĉirkaŭ du jaroj, kiam viaj delegitoj estis en Varsovio, rakontante pri la agado de via rondeto kaj varbante volontulojn, mi, malgraŭ la skeptikemo kiun donis al mi mia peza sperto, tiel entuziasmiĝis, ke en la unua minuto mi preskaŭ decidis adiaŭi mian pasintecon, neglekti la longajn jarojn dum kiuj mi preparadis min por difinita agadkampe, kaj forveturi — nur por eklabori en Palestino je du jaroj pli frue. Via estonta agado kaj ties rezulto prezentiĝis al mi en plej alloga aspekto. Kvankam mi ne revis simile al s-ro Minc pri milionoj², kiuj ŝutiĝos al la biluanoj, tamen mi longe estis konvinkita, ke la biluanoj faros grandegan servon por nia popolo malgraŭ tro malgranda subteno. Ja mi pensis: “Jen grupo da junuloj, kiuj ne devas zorgi pri edzinoj, infanoj, fratinoj kaj gepatroj³, kaj kiuj do povos almenaŭ dum kelkaj jaroj tute fordoni sin por la amata afero. Tiaj homoj povas fari miraklojn: iliaj bezonoj estas minimumaj, sed ilia energio estas sufiĉe granda. El la historio oni scias, kion faris grupetoj da liberaj junuloj, dediĉintaj sin al iu afero. La plej bonaj dungitoj, provizitaj per la plej riĉaj rimedoj, ne povas fari tion, kion faras grupeto da junuloj, kiuj posedas nur dek fortajn fingrojn, sed ankaŭ klarajn mensojn kaj varmajn korojn. Vi povus ekloĝi sur dezerta roko kaj transformi ĝin en surteran paradizon per komuna laboro, per konstanta disvastiĝo eksteren, per plimultiĝo kaj per interna pliboniĝo. Kaj la roko transformiĝus en vilaĝon, kaj la vilaĝo — en potencon Romon...” Sed tio estas nur fantazioj, ĉar tute mankas eĉ ĝermoj! Vi forveturis jam antaŭ unu jaro kaj duono, sed via afero statas same kiel en la komenco. Ne, pli malbone, ege pli malbone! Tiam estis espero, tiam via afero ankoraŭ aperis al ĉiuj en plej rozaj koloroj, sed nun vi preskaŭ ĉie tute perdis ĉian fidon. Pri tio mi, bedaŭrinde, devis ĉiupaŝe konvinkiĝi: eĉ en la optimista “Kolonist”⁴ mi legis malkontenton pri vi. Laŭ mia deŭflanka kompreno, tio okazis pro tio, ke “bakisto komencis fari botojn”⁵. Ve al la popolo, en kiu Aĥiloj prikantas la konkeron de Trojo, sed maljunaj Homeroj devas batali kontraŭ Hektoroj. Prefere maljunaj Bismarkoj fondu diplomaciajn kancelariojn, sed junaj Körneroj⁶ donu siajn muskolozajn brakojn al la patrujo, donu al ĝi sian fajron, sian flaman kaj konscian patriotismon! Jam la duan jaron vi estas ekster Ruslando, sed kion vi faris? Per la mono, kiun por vi uzis vi mem aŭ viaj samgentanoj, vi jam delonge povus bonege kaj ekzemplodone establiĝi kaj montri al la mondo la rezulton de via tuta laboro en la formo de modele aranĝita kolonio, sufiĉa ne nur por vi mem, sed ankaŭ por novaj kolonianoj, kiuj laŭ vi estus taŭgaj. Sed ĝis nun vi faris nenion. Kiam oni eksciis, ke grupo da inteligentaj junuloj direktiĝas al Palestino, ĉiu pensis, ke la diferencoj de ĉi tiu grupo de ĉiuj ceteraj agantoj kaj koloniantoj de Palestino estas: a) nesperteco, malgrava socia stato kaj, sekve, malgranda politika influo kaj malgranda aŭtoritateco — sed kompanse b) juneca fajro kaj senlima sindono al la afero, kleraj mensoj, manko de familia ŝarĝo, kio ebligas al la homo plezure oferi siajn interesojn al la intereso de sia komunumo, anstataŭanta por li la familion, kaj de sia popolo; noblaj junecaj ambicioj kreantaj Davidojn kaj Bar Koĥbajojn⁷, Muciusojn Scaevolojn⁸, Makabeojn kaj ferajn pionirojn, kiuj sen groŝo en la poŝo iris al foraj transoceanaj landoj por transformi tie sovaĝajn arbarojn en florgardenojn kaj por altigi tie la nomon kaj forton de sia popolo; ankaŭ manko de tiuj bagatelaj ambicioj, per kiuj tiel



1. Sur la sigelo estis pejzaĝo de la Judea Montaro.

2. Re prezentanto de BILU, Moŝe Minc, promesis, ke judaj kapitalistoj financos la komunumon de BILU en Palestino.

3. Preskaŭ neniuj biluano havis familion. Laŭ la statuto, poste akceptita, biluanoj ne rajtis edziĝi dum tri jaroj. Tamen inter la biluanoj estis moskvaj gefianĉoj Ĥaim Ĥisin kaj Fanja Frizer, kiuj geedziĝis en Palestino.

4. “Der Kolonist” (La Koloniano). Germanlingva semajna gazeto en Kattowitz (nun Katowice en Pollando).

5. El la fabelo de Ivan Krilov *La kato kaj la ezoko*: “Ĝi estos malfeliĉa, se bakos la botisto / kaj botojn faros la bakisto” (Krilov I. *Elektitaj fabeloj* / Trad. S. Rublov. Antverpeno; La Laguna, 1979, pĝ. 137).

6. Körner, Karl Theodor (1791–1813). Germana poeto, aŭtoro de patriotaj kantoj. Kiel volontulo batalis kontraŭ Napoleono kaj pereis dum la milito.

7. Bar-Koĥba, Ŝimon (bar-Koziba). Gvidanto de ribelo kontraŭ Romio dum 132–135 p.K. La ribelantoj sukcesis liberigi Jerusalemon, sed romia armeo venkis ilin kaj kruele punis la venkitojn.

8. Scaevola, Caius Mucius. Romiano, kiu laŭ legendo en 507 a.K., kiam etruskoj sieĝis Romon, penetris en la etruskan tendaron por mortigi ilian reĝon Porsenna. Kaptite, li por montri sian indiferenton pri torturoj metis sian brakon en fajron kaj silentis dum ĝi estis brulanta.

9. La tria kaj la sesa (*hebreo*). Du el la sep legaĵoj de la Sanktaj Skriboj en la sinagogo. La voĉlegado estis honorigo por la leganto.


10. Sidlokoj ĉe la orienta muro en la sinagogo, rezervitaj por gravuloj.

11. Citaĵo el la raporto pri BILU en la semajna hebrealingva ĵurnalo *Hamagid* (aŭ *Ha-Maggid*, t.e. Predikanto) 25 jul 1883, eldonata ekde 1856 en Lyck (tiam Prusio, nun Ełk en Pollando), poste en Berlino (1890–1892) kaj Krakovo (1892–1903). “Alta Portalo” estas kutima eŭfemismo por la sultana registaro en Turkio.

12. Distribuado de mono, kolektita en la internacia juda diasporo, inter la judoj loĝantaj en Israelo precipe pro religiaj kaŭzoj.

13. La rilatoj de la maldekstremaj biluanoj kun kapitalisto Rothschild kaj ties reprezentantoj estis malfacilaj. Kelkajn semajnojn post ĉi tiu letero de Zamenhof, Belkind estis eksigita el Riŝon Lecion.

La emblemo de BILU



distingiĝas nia popolo kripligita de la sklaveco, bagatelaj ambicioj kaj politikumado, kiuj devigas la homojn *pereigi unu la alian per intrigoj kaj denuncioj* pro “ŝiŝi” kaj “ŝliŝi”⁹, pro loko ĉe la orienta muro¹⁰, pro regado super ĉiuj kaj pro gvidado de la afero, bagatelaj ambicioj transformantaj junulojn en Donkiĥotojn, kiuj pensas savi sian popolon per kancelariaj formalajtoj, per diplomataj ludoj, per presado de formularoj kun frapantaj titoloj kaj diversaj sigeloj, per intertraktado kun registaroj (temas pri homoj junaj, nespertaj kaj konataj de neniu!), kaj per sendado de neinvititaj gvidantoj al kolonioj ekzistantaj kaj fondiĝantaj.

Ĉiu, kiu aŭdis pri via grupo, supozis ke ĝi havas ĉiujn menciitajn pozitivajn kvalitojn kaj nenium el la negativaj, — sed... rezultis seniluziigo. Kaj nun oni rigardas vin kiel vagantajn *nihilistojn* (ne socialistojn), kaj tiel jam iu skribis pri vi en “Kolonist”. Perditaj, perditaj estas la brilaj junaj fortoj, kiuj ŝajnis la aŭroro de la savo, nia nomo estas malhonorita, ĉar ni montris al la mondo, ke nia junularo diferencas de junularo de aliaj popoloj...

Sed vi ja povus fari ion! Se vi, same kiel ĉiuj kolonianoj, senprokraste veturus al la loko por tuj ricevi grundon sub la piedoj kaj establiĝi en difinita loko, vi kun viaj malmultaj bezonoj jam delonge povus aranĝi tion kontraŭ viaj propraj groŝoj, kiujn vi havis, kaj precipe kontraŭ la mono, kiun vi uzis por kunsidadi en Konstantinopolo, “intertrakti kun la Alta Portalo”¹¹, funkciigi grandan kancelarion ktp. Se, kontraŭ la atendo, ĉiuj tiuj rimedoj ne sufiĉus, vi povus, anstataŭ dissendi tra la mondo multajn malklarajn alvokojn kaj leterojn, predikojn kaj mensogojn, — anstataŭ tio vi povus unu fojon turni vin al iu riĉulo aŭ al la popolo kun alvoko pri tio, ke vi intencas fondi kolonion kaj ke mankas al vi certa sumo, kaj tiuokaze ĉiu volonte donus monon, ĉar ĉiu volonte subtenas nove fondatajn koloniojn, precipe tiun kolonion, kiun vi povus fondi, sed ĉiu fortunus sin de homoj, kiuj simple petas monon, ĉiam petas monon, sen difinita celo, nur por havi la eblon plu ekzisti kaj plu peti monon. Kio tiuokaze estas la diferenco inter vi kaj la homoj kiuj vivtenas sin per haluka¹²? Tio, ke ili studas la Talmudon, sed vi skribas leterojn!

Ni *scias* ion pri ĉiuj forveturintoj al Palestino, ni vidas rezultojn de ilia agado, pri kiu ni havas detalajn informojn, malgraŭ tio ke skribado de leteroj por ili estas nur ripozo, sed ne la ĉefa afero. Tamen ni scias nenion pozitivan pri vi, ĉar ĉiuj viaj leteroj (mi parolas [ne] nur pri tiuj, kiujn mi ricevis) konsistas el ĉiama ripetado de la samaj altaj vortoj, foje kun faktoj pri aliaj personoj kaj kolonioj, kiujn ni jam scias, sed estas *neniuj faktoj pri vi mem!* Nur malofte ni ekscias pri viaj diversaj rifuzoj. Ekzemple, en via lasta letero al mi estas skribite, ke Rothschild volas loĝigi 30–50 biluanojn ĉe Riŝon Lecion¹³, sed vi rifuzis! Kion vi faris? Finfine vi ricevis la eblon stariĝi sur firma grundo, sed vi rifuzis. Kiel Riŝon Lecion ĝenus vin? Vi povus establiĝi ĉe ili tute sendepende, ĉar ĉiuokaze la komunaj devoj, kiujn vi havus rilate al la tuta kolonio, estus tute malgravaj kaj ili ne malhelpus al vi per fortoj komunaj zorgi pri fondo kaj plifortigo de via parto, kaj poste, firmiĝinte, vi povos per viaj propraj fortoj fondi plurajn koloniojn aŭ unu grandan kolonion. Se al vi ne plaĉas la interna vivo de la kolonianoj (kiuj tamen nun ĝuas ĉie pli grandan simpation ol vi), influu ilin per via *bona ekzemplo*, kiu efikos infekte, sed ne per paroladoj kaj riproĉoj. Ĉiam memoru, ke nun necesas multon pardoni, kaj, se ni ne volas pereigi la novan aferon kiu ankoraŭ ne firmiĝis, nia slogano nun devas esti plena unueco, reciproka amikeco kaj helpemo. Kaj kiam vi ĉesos flugadi en la aero, stariĝos sur firma grundo, kaj la popolo vidos iajn rezultojn de via laboro, tiam vi denove havos la simpation de la popolo, kiel jam delonge devus esti. Uzu ĉiujn viajn fortojn por establiĝi (en la komenco eble ĉe alia kolonio, sed kune) kaj komenci klare difinitan *laboron!* Forĵetu vian politikumadon kaj agu tiel, kiel devas agi grupo de junaj pioniroj. Kiel via sincera amiko, kiel via frato en la ideoj kaj aspiroj, eble kiel via estonta kamarado, mi tre petas vin pripensi miajn vortojn. Ne ofendiĝu pro la enhavo de mia letero, ĉar ĉi tiun leteron al mi diktis ne dezire aflikti vin.

Mi supozas, ke pro malagrabra impresio de mia letero vi eble ekkrios: “Jen la moralisto! Por li estas facile prediki, sed ĉu li mem jam multe da tero fosis?” Eble vi tiel ekkrios kaj konsideros *vin mem jam pravigitaj*. Ĉi tie, certe, ne estas loko por respondi tiajn supozatajn ekkriojn, sed mi petas vin ne kontentiĝi pri *tiu maniero* de reago al mia opinio. Imagu, ke ĉi tiu letero estas sendita de anonimulo, kaj pensu nur pri tio, kio estas skribita en ĝi.

Ankoraŭfoje mi ripetas mian opinion: Necesas senprokraste establiĝi surloke, forĵeti la rolon de diplomatoj, administrantoj ktp, kaj influi aliajn kolonianojn kaj logi novajn pionirojn nur per la modeleco kaj prospero de via energie prilaborata, firmigata, vastigata kaj plibonigata kolonio. Vi ne konvinkos min, ke mia opinio estas teorie erara, sed eble ĝi estas fakte neĝusta, pro tio ke ĝi fontas el nescio de lokaj kondiĉoj kaj nesufiĉa konatiĝo kun via agado, do... vi scias, ke mi kun plezuro ricevas ĉiun informon de vi, kvankam mi konfesas, ke ĝis nun min plezurigis la ricevado mem de la leteroj, sed la enhavo... preskaŭ tute mankis.

Pri nia komitato¹⁴ ĉi tie dume ne estas tre multaj konsolaj informoj. Kun peno ni sukcesis fari ion, tamen neniu volas labori, sed ĉiu pretas brui kaj bremsi. Efektive, laboras nur niaj studentoj kaj sinjoro Rabinoviĉ¹⁵ (la komitato evoluis el nia “kaso”¹⁶, pri kiu mi iam skribis al vi); la komitato dume nur “kunsidas” kaj bremsas. Ni certe esperas je pliboniĝo. Nun la enspezo estas ĉirkaŭ 250–300 rubloj monate.

Mi senpacience atendas la statuton kaj la programon de via estonta agado, kiujn vi promesis. Mi estus tre ĝoja, se vi donus al mi iun eblon restarigi vian krediton ĉi tie. Ĝis nun ni scias pri vi nenion pozitivan: kiom da vi estas, ĉu vi plu konsistigas unu grupon, ĉu la laboristoj, elirintaj el BILU¹⁷, havas iun rilaton al la biluaj kancelarianoj, ĉu vi havas gvidanton, elektitan de vi kaj rekonitan de ĉiuj, kie estas viaj fortoj, kiujn rimedojn vi havas, por kiuj kaj kiel estas uzata la mono sendita al vi? Ĝenerale, estas dezirinde ricevi iun raporton pri via agado (sed ne tiun raporton, kiu aperis en “Hamagid”, ĉar tiu raporto diras nenion, el ĝi ni scias nur, kion faras kelkaj personoj elirintaj el BILU, sed kion la tuta grupo faras kiel grupo?)

Via amiko,
L.M. Zamenhof



Biluanoj kun tradiciaj arabaj kapvestoj.

14. Societo de Ĥovevej Cion (Amantoj de Ciono) fondiĝis en Varsovio 18 aŭg 1883 per unuiĝo de du societoj de Ĥibat Cion kun la studenta societo Ŝeerit-Israel (Restaĵo de Izraelo), organizita de Zamenhof en 1882.

15. Rabinoviĉ, Ŝaul Pinĥas (Rabinowicz, ps. Ŝefer, 1845–1910). Juda socia aganto kaj literaturisto, sekretario de Ĥovevej Cion en Varsovio. Israel Jasinowski (1842–1917) estis prezidanto, kaj Zamenhof — ĉefo de la plenumkomitato.

16. Ĉar Ŝeerit-Israel okupiĝis plejparte pri kvestado por Palestino, ĝi estis nomata ankaŭ Ĥevrat-Govim (societo de kasistoj).

17. Temas pri la grupo de Belkind, kiu en *Razsvet* (1882, №48) deklaris rompon kun la buroo en Konstantinopolo. La situacio pliboniĝis, kiam Jehiel Miĥal Pines (1843–1913) helpe de Ĥovevej Cion aĉetis por biluanoj terenon, sur kiu en decembro 1884 estis fondita kolonio Gedera. (Ankaŭ Cukerman kaj Belkind ekloĝis tie.)

Ĉi tiu letero estas nur unu el 77 Zamenhofaj verkoj, presitaj en MEH. Pri tiaj verkoj oni diras, ke “ĉiu esperantisto devas ilin legi almenaŭ unu fojon”. Nun tio estas ebla. Prenu do la libron, malfermu ĝin, ekzemple, je la 99a paĝo kaj legu:

«... mi estas hebreo, kaj ĉiuj miaj idealoj, iliaj naskiĝo, maturiĝado kaj obstineco, la tuta historio de miaj konstantaj bataladoj internaj kaj eksteraj — ĉiuj estas sendisige ligitaj kun tiu ĉi mia hebreco. Mi neniam kaŝas mian hebrecon kaj ĉiuj esperantistoj tion ĉi scias; mi kun fiereco alkalkulas min al tiu ĉi tiel antikva kaj tiom multe suferinta kaj batalinta popolo, kies tuta historia misio konsistas, laŭ mia opinio, en la unuiĝo de la nacioj en la celado al “unu Dio”, t.e. unuj idealoj por la tuta homaro...

Se mi ne estus hebreo el la ghetto, la ideo pri la unuiĝo de la homaro aŭ tute ne venus al mi en la kapon, aŭ ĝi

neniam tenus min tiel obstine en la daŭro de mia tuta vivo. La malfeliĉon de la homara disiĝo neniu povas senti tiel forte, kiel hebreo el la ghetto. La necescon de lingvo sennacia, neŭtrale homa neniu povas senti tiel forte, kiel hebreo, kiu estas devigata preĝi al Dio en jam longe mortinta lingvo, ricevas sian edukadon kaj instruadon en lingvo de popolo, kiu lin forpuŝas, havas sam-suferanojn en la tuta mondo kaj ne povas kun ili kompreniĝadi. Mi havas nun nek tempon, nek paciencon por detale klarigi al vi la situacion de la rusaj hebreoj, kaj la influon de tiu ĉi situacio sur mian tutan celadon kaj bataladon. Mi nur simple diros al vi, ke mia hebreco estis la ĉefa kaŭzo, kial mi de la plej frua infaneco fordonis min tutan al unu ĉefa ideo kaj revo — al la revo pri la unuiĝo de la homaro.

Tiu ĉi ideo estas la esenco kaj celo de mia tuta vivo, la afero Esperanta estas nur parto de tiu ĉi ideo — pri la



tuta cetera parto mi ne ĉesas pensi kaj revii; kaj pli aŭ malpli frue (eble tre baldaŭ), kiam Esperanto jam ne bezonos min, mi elpaŝos kun unu plano, por kiu mi jam de longe prepariĝas...»

(*Letero al Michaux, 21. II. 1905*)



La farbita vulpo

de Ivan Franko

Ivan Jakovleviĉ Franko (1856–1916) kune kun Taras Ŝevĉenko kaj Lesja Ukrainka apartenas al la plej fama triopo de la ukrainlingva literaturo. Li naskiĝis antaŭ 150 jaroj, la 27an de aŭgusto 1856, apud Drohobiĉ (nun: Lviva provinco en Ukrainio). Studis filozofion kaj literaturon en la universitato de Lviv, doktoriĝis pri slavistiko en Vieno. Pli ol 50-voluma verkaro de Franko enhavas poemojn, prozon, dramojn, porinfanajn verkojn, studojn pri ekonomiko, filozofio, politiko. Li redaktis revuojn en la lingvoj ukraina, pola, germana; tradukis en la ukrainan el lingvoj klasikaj kaj modernaj, kaj el la ukraina en la polan kaj germanan. Oni ofte nomas lin “Ŝtonisto” laŭ lia samtitola poemo. Multaj liaj poemoj estis tradukitaj en Esperanton, ili kaj *La Farbita Vulpo* aperos en la *Ukrainia Antologio*.

En iu arbaro vivis Vulpo Mikito, ruza-ruzega. Kelkfoje postkuris lin ĉasistoj, persekutis hundoj, oni starigis kontraŭ li kaptilojn, lasis por li venenitan viandon, sed neniel oni povis mortigi lin. Vulpo Mikito primokis onin, preterpasis diversajn danĝerojn, eĉ avertis aliajn siajn kamaradojn. Kaj kiam li ekĉasis, ĉu en kokejo, ĉu en provizejo, tiam ne estis pli kuraĝa, pli inventema kaj pli lerta ŝtelisto, ol li. Eĉ tagmeze li ĉasadis kaj neniam revenis sen predo.

Pro tiu ĉi eksterordinara sukceso kaj pro la ruzeco li fariĝis fierega. Ŝajnas al li, ke ekzistas nenio malebla por li.

— Kion vi opinias! — li fanfaronis antaŭ siaj kamaradoj. — Ĝis nun mi vagadis tra vilaĝoj, sed morgaŭ mi iros urben tagmeze kaj forŝtelos en bazaro Kokinon.

— Ne diru sensencaĵojn! — perŝadis lin la kamaradoj.

— Kion, sensencaĵojn! Vi vidos! — daŭrigis Vulpo.

— Ni aŭ vidos aŭ ne vidos. Tie tra stratoj amase vagas hundoj, nur se vi aliformiĝos je Pulo, ili ne vidos vin kaj ne disŝiros.

— Tamen vi vidos, ke mi ne estos aliformita je Pulo kaj ne estos disŝirita! — pistis siajn vortojn Vulpo kaj decidis morgaŭ, dum bazartago, kuri urben kaj forigi Kokinon de la vendoplaco.

Sed ĉi-foje povra Mikito miskalkulis. Inter maizo kaj kanabo li sekure rampis ĝis antaŭurbo; tra legomĝardenoj, saltante trans barilojn kaj kaŝante sin en tritiko, li atingis la urbocentron. Sed jen malsukceso! Necesis nur por unu momento elsalti surstraten, kuri al

vendoplaco kaj reveni. Sed sur la strato kaj sur la vendoplaco estas bruo, kriado, senordo, kaleŝoj knaras, radoj tondras, ĉevaloj frapas per hufoj, porkoj kvikas, kamparanoj blasfemas — resume, estas tia tumulto, kian nia Mikito eĉ ne povis imagi.

Sed kion fari! Se oni ekis, do, necesas fini la komenciton. Sidinte dum kelkaj horoj inter loloj ĉe barilo, li kurtimiĝis al bruego. Foriginte la unuan timon kaj taksinte, kien kaj kiel estas la plej bone kuri por atingi la celon, Vulpo Mikito kuraĝiĝis, kurstartis kaj saltis trans barilo surstraten. Tie multaj homoj iris kaj veturis, ĉie turbulis polvo. Preskaŭ neniu rimarkis Vulpon, al neniu li estis interesa. “Jen Hundo kiel Hundo”, — pensis preterirantoj. Kaj Mikito ĝojis pri tio. Li konfuziĝis, kurbiĝis kaj ekkuris tra la fosaĵo al la vendoplaco, kie en longaj vicoj sidis virinoj, vendecele tenantaj en kribriroj, korboj kaj saketoj ovojn, buteron, fungojn, tolon, semojn, kokojn, anasojn kaj aliajn belajojn.

Ne sukcesis li atingi la vendoplaceton — kuras al li renkonten Hundo, de alia flanko proksimiĝas la dua, jen li vidas la trian. Hundojn ne trompos nia Mikito. Ili tuj flarsentis, kio li estas, ekhurlis kaj ĵetis sin al Vulpo! Dio mia, kia teruraĵo! Nia Mikito ŝrumpis, kiel muŝo en bolanta akvo: kion fari? kie malaperi? Li tuj glitiris en la plej proksiman malfermitan vestiblon, de tie — korten. Li denove kurbiĝis kaj ĉirkaŭrigardis pensante, kie kaŝi sin, kaj fiksaŭskultis, ĉu alkuras hundoj. Jen! Oni aŭdas ilin! Jam proksime! Ekvidis Vulpo barelon en angulo. Kaj

ne longe pensante, li saltis en la barelon kaj tie kaŝis sin.

Feliĉa li estis, ĉar apenaŭ li kaŝiĝis, en la korton alkuris hundamaso bojanta, hurlanta, flaranta.

— Li estis ĉi tie! Li estis ĉi tie! Serĉu lin! — kriis antaŭstarantoj.

La tuta amaso disiĝis sur la malvasta korteto, tra ĉiuj anguletoj, ili fosetis, flaris, gratis — Vulpo kvazaŭ elvaporigis. Kelkfoje ili proksimiĝis al la barelo, sed ĝia fiodoro forpelis ilin. Fine, trovinte nenium, ili kuris plue. Vulpo Mikito estis savita.

Savita, sed kiel!

La barelo, kiu senatende utilis al li, estis pli ol duone plenigita per dense oleigita blua farbo. Sciu, ke en la domo loĝis kolorigisto, kiu farbis murojn, barilojn kaj ĝardenbenkojn.

Ĝuste morgaŭ li devos kolorigi iun barilpecon kaj pretigis tiucele la tutan barelon da farbo kaj starigis ĝin en kortangulo. Ensaltinte la solvaĵon Vulpo Mikito unue plonĝis tutkorpe kaj preskaŭ sufokiĝis. Poste, atinginte per siaj piedoj barelfundon, li staris kun la kopo farbenigita kaj nur la kapo, ankaŭ kolorigita blue, iom eliĝis super la farba supraĵo. Tiel li atendis forpason de la danĝero. La koro de la povrulo bategis, malsato tordis la intestojn, la oleodoro preskaŭ sufokis lin, sed kion fari! Dank’ al Dio li vivas! Kaj kiu scias, kio okazos, se venos barelmastro kaj trovos lin ĉi tie?

La situacio estis senkonsola. Preskaŭ mortante pro la timo, la kompatinda Mikito devis sidi en la farbo ĝis vespero, bone sciante, ke se nun, en tiu vestaĵo li aperus surstrate, tiam ne hun-

doj, sed homoj persekutis lin kaj ne lasus lin pluvi. Nur dum krepusko Vulpo Mikito fulmrapide elsaltis el sia neordinara banejo, transiris la straton kaj, observate de neniuj, enrampis ĝardenon kaj de tie, tra lolaro kaj brasikbredo, trans bariloj kaj maizo li kuregis al la arbaro.

Ankoraŭ dum longa tempo, ĝis la farbo estis forviŝita kaj sekigita, lin postsekvis blujaj piedsignoj. Jam sufiĉe vesperiĝis, kiam Mikito atingis la arbaron, nur ne la flankon de sia hejmo, sed la kontraŭan. Li estis malsata, laca, apenaŭ viva. Li devis plukuri ankoraŭ du mejlojn, sed fortoj mankis. Tial, manĝinte kelkajn ovojn, trovitajn en la nesto de Koturno, li enrampis la unuan liberan ter-kavon, enfosiĝis en foliamason kaj ekdormis efektive, kvazaŭ post varmakva banado.

Sekvatage li vekigis, ĉu frue aŭ ne — oni ne menciis en libroj, nur estas konate, ke vekiginte, oscedinte kun plezuro kaj trifoje kraĉinte tiun flankon, kie hieraŭ li spertis fiaventuron, li singarde, vulpe elrampis el la kaŝejo. Rig-rig! Flar-flar! Ĉie estis kviete, mallaŭte, pure. Ekbatis la koro en la vulpa brusto. “La tempo taŭgas por ĉasado!” — li pensis. Sed en tiu momento li ĉirkaŭrigardis sin — Dio mia! Eĉ ekkriis povrulo. Kio ĝi estas? Ektiminte li ekkuris, sed oni ja ne povas forkuri de si mem!

Li haltis kaj denove fiksrigardis sin: ĉu estas mi? Ĉu miaj estas ĉi pelto, ĉi vosto, ĉi piedoj? Ne, ne povis li ekkoni ilin. Jen stranga kaj terura besto, blua-blua, kun fiadoraĉo, kovrita ĉu per skvamo, ĉu per dornaj nodoj, ĉu per erinacaj pikiloj, jen vosto — ne vosto, sed io granda kaj peza, kiel batilo aŭ pistilo, kaj ankaŭ dorna.

Haltis mia Vulpo kaj fiksrigardis tiun monstron, en kiun li transformiĝis, ĉirkaŭflaris ĝin kaj provis taŭzi sin — sensukcese. Jen li penis ĉirkaŭruliĝi sur herboj — malsukceso! Jen li provis forgrati la skvamon per la ungegoj — la haŭto doloras, sed ne lasas! Jen li penis leki — vane denove! Li alkuris al flako, saltis akven por forlavi la farbon — diablo prenu ĝin! La farbo ja estis olea, ĝi sekiĝis kaj rigidiĝis en varmo dum nokto. Faru, kion vi volas, povrulo Mikito!

En ĉi momento neatendite venis fraĉjo Lupo. Ankoraŭ hieraŭ li estis bona konato de nia Mikito, sed nun,

ekvidinte ĥimeran bluan beston kovritan de dornoj kaj piknodoj, kun tiu grandega vosto, kvazaŭ el kupro gisita, li ekhurlis pro timo kaj, rekonsciiĝinte, fulme ekkuris. En la arbaro li renkontis Lupinon, poste Urson, Apron, Cervon — ĉiuj demandis lin, kio okazis, kial li forkuras, sed Lupo ploretis, larĝigis la okulojn kaj nur balbutis:

— Tien! Tien! Ĝi estas tiom timegiga! Ho, kaj tiel teruraspekta!

— Tamen kiu kaj kia? — ne ĉesis demandi lin parencoj.

— Mi ne scias! Mi ne scias! Ĝi estas tiel terura!

Kia miraklo! Kunvenis ĉirkaŭe multaj bestoj, konsolis lin, donis trinki akvon. Simio Fruzja eltondis al li tri harfaskojn inter la okuloj kaj lasis ilin flugi laŭ vento por ke lia timo disbloviĝu, sed ĉio vanis. Vidinte, ke Lupo spertis malfeliĉon, la bestoj decidis iri en la direkton, montritan de Lupo, por rigardi, kio timiga estas tie. Ili venis al tiu loko, kie ankoraŭ turniĝis Vulpo Mikito, ekvidis lin kaj diskuris. Dum la mondo ekzistas kaj la arbaro kreskas, neniuj vidis tiun beston nek aŭdis pri li. Kaj kiu scias pri lia forto, pri liaj dentoj, liaj ungegoj, kaj kiun volon li posedas?

Kvankam multe turmentis Vulpon Mikito lia nova aspekto, li bone komprenis, kiel ĝi impresis komence Lupon kaj nun aliajn bestojn.

“Hej, — pensis la ruza Vulpo, — sed ne malbonas, ke ili tiel timas min! Tiel mi povos bone profiti! Nur atendu, mi montrus min!”

Kaj levinte la voston, fiere pufinte sin, li marŝis en arbaran densaĵon, kie, li sciis, estis kunvenejo por la tuta arbara loĝantaro. Tiutempe la famo pri la nova neordinara kaj terura besto disflugis tra la arbaro. Bestaro, loĝanta en la arbaro, volis almenaŭ de malproksime rigardi la novan gaston, sed neniuj

kuraĝis alproksimiĝi. Kaj Vulpo Mikito kvazaŭ ne vidante tion, marŝis majeste, kvazaŭ profunde pensante, kaj veninte al la centro de besta placo, li sidiĝis sur tiu ŝtupo, kie kutime ŝatis sidi Urso.

Jen li sidas kaj atendas. Post malpli ol duonhoro kunvenis ĉirkaŭ la placo nekalkulebla bestamaso. Por ĉiuj estis interesa la novaperinto, ĉiuj timis ĝin, neniuj kuraĝis aliri. Ili staris malproksime, tremis kaj atendis momenton por forkuri.

Tiam Vulpo afable sin turnis al ili:

— Miaj karaj! Ne timu min! Venu pli proksime, mi devas diri al vi ion gravan.

Sed bestoj ne aliris kaj nur Urso, apenaŭ elspirinte, demandis:

— Kiu vi estas?

— Iru pli proksimen, mi ĉion rakontos al vi, — karese kaj dolĉe parolis Vulpo. La bestoj iom moviĝis, sed ne proksimiĝis.

— Aŭskultu, miaj karaj, — parolis Vulpo Mikito, — kaj ĝoju! Ĉi matene sankta Nikolao modlis min el ĉiela argilo — rigardu, kiel ĝi bluas! Kaj viviginte min per sia spirito li diris: “Ho Besto-Saĝulo! En la besta mondo ekregis senordeco, maljusta juĝo kaj maltrankvilo. Ĉies vivo kaj ĉies havaĵo estas malsekuraj. Iru sur la teron kaj estu caro por la bestoj, starigu ordon, juĝu laŭ vero kaj lasu al neniuj ofendi miajn bestojn!”

Aŭdinte tion, la bestoj aplaŭdis.

— Ho, sinjoro nia! Ĉu vi estos nia bonfarulo, nia caro?

— Jes, ho infanoj, — respektoplejne diris Vulpo Mikito.

Neordinara ĝojo ekestis en la besta regno. Ĉiuj komencis ordigi ĉion. Agloj kaj falkoj kaptis kokojn, lupoj kaj ursoj buĉis ŝafojn, bovidojn kaj alportis viandamason al la nova caro. Tiu ĉi prenis parteton por si mem kaj la reston juste disdividis inter ĉiuj malsatuloj.

Denove ĝojo, denove krioj de admiro kaj danko. Jen caro! Jen bonfarulo! Jen saĝa Salomono! Kun tiu caro ni vivos eterne, kiel en Dia paradizo!

Tagoj pasis post tagoj. Vulpo Mikito estis bona caro, justa kaj bonkora, des pli, ke nun li ne bezonis ĉasi, spionobservi kaj murdi. Ĉion pretan, buĉitan, eĉ senplumigitan kaj sentripigitan portis al li komplezemaj ministroj. Kaj lia justeco estis kiel kutime



Bildo de Niko Voloŝin

besta: ju pli forta, des pli bona, kaj kiu estis pli malforta, tiu neniam gajnis proceson.

La bestoj vivis sub la nova caro same, kiel sen li: kiu ion kaptis aŭ trovis, tiu manĝis, kaj kiu malsukcesis, tiu malsatis. Kiun pafmortigis ĉasistoj, tiu devis pereji, kaj kiu forfuĝis, tiu, dank' al Dio, vivas ĝis nun. Tamen ĉiuj ĝojis, ke ili havas saĝan, potencan kaj afablan caron, kiu tute malsimilas al la aliaj bestoj.

Kaj Vulpo Mikito, iĝinte caro, vivis kiel en Dia paradizo. Li nur timis, ke la farbo ne malaperu de lia pelto, ke bestoj ne rekonu lin. Pro tio li neniam foriris dum pluvo, ne iris en arbaran densaĵon, ne gratis sin kaj dormis nur sur mola matraco. Kaj ĝenerale li atentis por ne perfidi sin antaŭ la ministroj, ke li estas Vulpo, sed ne Besto-Saĝulo.

Tiel pasis unu jaro. Venis datreveno de tiu tago, kiam li okupis la caran tronon. Bestoj decidis solene festi tiun daton kaj aranĝi grandan koncerton. Kolektiĝis koruso de vulpoj, lupoj, ursoj, oni komponis belegan glorkanton kaj vespere post la imponaj procesio, tagmanĝo kaj elpaŝoj omaĝe al la caro, la koruso grupiĝis kaj ekkantis.

Miraklo! Ursoj muĝegis base tiel, ke kverkoj tremis. Lupoj ektonis tenoron tiel, ke okuloj velkis. Sed kiam junaj vulpinoj en popolkostumoj soprane ekhurlis, la caro ne povis plu elteni. Lia koro estis superplena, lia singardemo ekdormis kaj li, levinte buŝegon, mem vulpe ekhurlis.

Dio mia! Kio okazis? Ĉiuj kantistoj tuj eksilentis. Ŝajnis, ke iu forprenis vualon de la okuloj de ĉiuj ministroj kaj caraj servistoj. Tiu ja estas Vulpo! La simpla farbita Vulpo! Kaj kolorigita per iu olea farbaĉo! Fi! Kaj ni pensis, ke li estas caro! Hej vi, mensogulo! Hola, trompulo!

Kaj forgesinte lian bonkorecon, lian senliman saĝecon, koleraj pro tiom longa trompado, ili kaptis la kompatindan Vulpon Mikito kaj disŝiris lin je pecetoj.

Kaj de tiu tempo originas eldiro: se iu homo kredas al falsa kamarado kaj permesas al li moktrompi; se iu fripono mensoge nebuligis vin, priŝtelis kaj vi sekve fariĝis iomete pli saĝa, oni diras: "Nu, mi tion sciis delonge! Mi tion spertis, kiel bestoj — farbitan Vulpon."

Tradukis el la ukraina lingvo
Viktor Pajuk

Poemoj el Madagaskaro

De Henriel Fidilalao

Henriel Fidilalao, la sola malagasa Esperanto-poeto, naskiĝis en Madagaskaro antaŭ 40 jaroj. Magistrigis pri la instruado de la lingvo kaj literaturo franca. Instruis la francan lingvon en ŝtata gimnazio kaj liceo; nun mastrumas Esperanto-firmaon pri importado kaj eksportado. Patro de kvar filoj. Esperantisto ekde 1986. Diplomita Cseh-instruisto, prezidanto de la Unuiĝo de Malagasaj Esperantistoj. Verkas poemojn kaj prozon, tradukas el Esperanto malagasen, kaj el la malagasa kaj franca en Esperanton, partoprenas en kompilado de la Esperanta-malagasa kaj malagasa-Esperanta vortaroj. Antaŭnelonge estis eldonita lia koresponda kurso de Esperanto por malagasoj.



DUONVORTE

*eterne kuŝos en mi sekretoj
pri amo, pri murd' aŭ pri krim'.
Sanktaj. Kaj ilin per mil epitetoj
silent' ornamos ĝis la fin'*

*atentu ĉar nur al vi tio dirindas
— fidinduloj — kies eco dissemi
grajnojn*

*fikcie similas al tiu de judas
pri kio komplezem' poluras ŝajnon.*

*nur al vi direblas ti'
eston on-ete apertu mi.*

NUBOJ

*Vesperas la somero
nur la pluvminaco
grize frisketas
kaj okulojn ekkaptis nuboj.*

*Kia stranga pastaĵo enĉiele,
modlita kvazaŭ frenezume!
Aŭ dratformas aŭ, kiel spongo
post bruliĝo, ŝvelas nuboj.*

*Nubo speguloza ĉe kontur':
jen nazo mestiza*

*jen jesukrista menton'
jen faŭko iom monstra.
Dume, neniu knedis la plej supran
blankon, (Por kiu mi vizite enviis)
oron ĉe pinto, plumbon ĉe angul'
bunta — tamen netretebla — reliefo
pura fascino kontraŭ hipokrita*

*metaleco
diste ĝuinda neĝo de l' sudanoj.
Nub' unu etaĝas aliajn
de la nigra peza kumulus'
al gracila leĝera cirus'
kies faskradio malfruas
sur la flanko de mia vizaĝo.*

SEN(A)MUZE

*Mi fidis je iu Muzo efemera
Eĉ folitremeto inspiris min
Tiel same tenero aŭ plor' karcera
Sed nun, jam venas la fin'.*

*Mi kredis je dieca knabino
Por kiu eĉ sanktul' sin dronas
Perfidaj okuloj tranĉas sen timo
Koron ebrian kiu ame ŝin kronas.
Ĉu daŭros la sufer'?*

*— Ne! Findecidas viktim' —
Kaj li kiel mi mem suĉas la sukon
el grundo sterila: turmento de
senamul',*

*Plu sekiĝas la font'. Inspiro ŝvebas
Elrete saltanta kaj ĉikanoj sinsekvas.
Kiu fakte knedus am-paston? Mi
trovos tamen
flakon, kiu glisigos min surpapere.*

LERNU REZIGNI

*Jam pasis temp' ĉion regi
ĉion mastri kiel solhavant'
ankaŭ aliul' rajtas flegi
ŝian amon — kun konkerĉant'!*

*Tamen, persistas spura amo
pro, eble, mispaŝo novica
sed liakoren tralikas de mamo
vivaromo, iom ome laŭvica.*

*Lernu pardoni, lernu je pacienc',
rezigni simile al pacribelo.
Jam promesiĝis rekompenc':
ne gumindas vi de ŝia fabelo.*



Sensoj, sentoj, sencoj

Boito, Camillo. *Senso / Tradukis el la itala Jean-Luc Tortel; Antaŭparolo de Carlo Minnaja. — Dobřichovice: KAVA-PECH, 2004. — 72 pĝ.*

Ne multon verkis la italo Camillo Boito (1836–1914), arĥitekto kaj arta kritikisto, sed lia novelo *Senso* iĝis tre fama, grandparte ĉar sur ĝi baziĝis la samtitola filmo de Visconti en 1954 (kaj plia fare de Brass en 2001). Temas pri sekreta taglibro de Livia, 39-jara grafino, kie ŝi rakontas sian iaman adultan amrilaton kun oficiro (kiam ŝi aĝis nur 23, kun dikventra edzo 62-jara). Ambaŭ tempoj alternas: la tiama, kun la milito de 1866 inter Italujo kaj Aŭstrujo kiel fono, kiun mi trovas tre interesa; kaj tiu posta de Livia, kiam ŝi rememoras kaj priskribas la kokran aventuron kaj ĝiajn krudajn sekvojn rekte, sentabue, senrimorse, eĉ cinike, tamen senpeziĝe.

La titolo aludas ŝian amon al sensaĵoj kaj plezuroj:

Venecio, kiun mi neniam ankoraŭ vidis, sed tiom deziris koni, parolis pli al miaj pensoj ol al mia spirito: ĝiaj monumentoj, kies historion mi ne konis, kaj kies belecon mi ne kaptis, malpli gravis al mi ol ĝiaj akvo verda, ĉielo stelplena, luno arĝenta, krepuskaj oraj kaj precipe ĝiaj nigraj gondoloj, kie, kuŝante, mi allasis min al plej voluptaj fantazioj.

La plursenca itala vorto “senso” verŝajne rilatas ankaŭ al ŝiaj sentoj dum ambaŭ periodoj de ŝia vivo. La rakonta voĉo elektita de Boito fikcias esti virino, kaj foje oni kvazaŭ perceptas interlinie liajn “voluptajn fantaziojn” pri la karaktero de Livia aŭ ĝenerale pri la virina karaktero, se io tia entute ekzistas. Sed oni ne legu ĉi novelon kiel verkitan en 2006. Probable oni jam tro kutimiĝis al romanoj kaj filmoj, kies aŭtoroj fikcias esti seria murdisto, horsulo, luksa putino aŭ reviviĝinta mumio.

La traduko legiĝas flue, kiel originalo. En la antaŭparolo Minnaja skribas ke “la traduko de d-ro Tortel preferis rezigni pri paŭsado de la frazostukturo kaj donis prioritaton al la travideblo: ofte li malimplikas la originaltekstajn frazojn kaj rekonstruas ilin pli klaraj”. Li povintus fari same pri sufiksoj, ekzemple en la sekva frazo: “Cetere bonulo, tute atentema, laŭ sia maniero, al sia juna edzino, diboĉema, laŭokaze blasfemema, senlaca fumanto, aroganta aristokrato, perfortema al timuloj kaj timema al perfortuloj, vigla rakontanto

de maldecaj anekdotoj ĉiaokaze ripetataj, nek avara, nek malŝparema”, kie 6-foja ripeto de “-ema” (mal)fidele respondas al pluraj sufiksoj de la itala (el kiuj “-ore” aperas nur kvarfoje); ja en alia okazo li aŭdace senbalastigas al “belinoj” kaj “stultino”. Agrable impresas ankaŭ disfoja apostrofado, kvankam ĝi povus jen soni komike okaze de laŭtleĝo: “l’ ardaĵ misteroj de l’ amo vera”.

Temas entute pri rekomendinda libreto plena je emocioj, pasioj kaj diversaj fioj.

Jorge Camacho

Mejloŝtona verko klerigas

Phillipson, Robert. *Ĉu nur-angla Eŭropo? Defio al lingva politiko / Tradukis el la angla István Ertl. — Rotterdam: UEA, 2004. — 254 pĝ.*

Ekde la 1a de majo 2004 estas 20 “oficialaj lingvoj kaj laboraj lingvoj de la Komunumaj institucioj” (Regularo n-ro 1, 1958). La Regularo difinanta la lingvojn uzendajn de la Eŭropa Ekonomia Komunumo estis la unua regularo, la plej unua dokumento “deviga kiel tuto kaj rekte aplikenda en ĉiuj membroŝtatoj”, en normala lingvaĵo la plej unua “EU-leĝo”. Ĝi baziĝas sur artikolo 290 (origine 217) laŭ kiu “la aranĝojn pri la lingvoj [...] fiksas la Konsilio aganta unuanime”.

La regularo restas enhave tute sensanĝa ĝis nun. La nuraj ŝanĝoj estas la aldono de pliaj lingvoj de la originalaj 4 de la 6-ŝtata organizaĵo al la nunaj 20 de la 25-ŝtata (2 en 1973, 1 en 1981, 2 en 1986, 2 1995, 9 2004, kaj ankoraŭ en 2007 estos aldono de la irlandano).

La esperanta traduko de Regularo n-ro 1 aperas sur paĝo 122 de *Ĉu nur-angla Eŭropo?* de Robert Phillipson. Tial, tiupaĝe, jam post la mezo de la libro, mi komencas la recenzon. Por mi, kiel esperantista aktivulo kun aparta intereso al la juraj aspektoj de la

lingvovogelo, la 8 artikoloj de Regularo n-ro 1 havas apartan valoron kiel jura bazo por sistemo, tiom ofte kritikata. Regularo n-ro 1 devus esti deviga ero de la baza klerigo por ĉiuj agantoj en la lingvopolitika EU-tereno. Konante ĝin kaj la realon, bazitan sur tiu regularo, sed ankaŭ maskitan de la sama, ni havas ŝancon influi.

La multaspekta libro de Phillipson ne estas jura trarigardo, sed kleriga verko por ĝenerala interesita publiko verkita de kompetenta lingvisto. Ĝi estas popularigo de konaj akiritaj dum multaj jaroj de honesta engaĝiĝo por kompreni dinamikojn de la lingvopovaj rilatoj. La anglalingva libro vekis vastan atenton ankaŭ en mia lando. Tamen tradukita ĝi estas nur al unu lingvo, al esperanto. La traduko de István Ertl estas fidela kaj flua. Ĝi helpas nin esprimi nin, nialingve, pri la lingvopolitikaj temoj tiom karaj al ni.

Ĉu nur-angla Eŭropo? priskribas la 11-lingvan 15-ŝtatan Eŭropan Union, sed ĝi ne estas malnova. Ne nur la jura bazo restas la sama, ankaŭ la problemoj. Aliflanke, pro la ĉiam pli forta anglalingviĝo, ankaŭ la politika atento al la lingvaj problemoj kreskas. Por la kresko de la prestiĝo de esperanto la verko estas mejloŝtona pro la senantaŭjuĝa atento al la lingvo.

Notinde estas ke ankaŭ la citoj dorskovrile estas la samaj kiel en la originalo. Inter Neil Kinnock, tiama vicprezidanto de la Eŭropa Komisiono, Joseph Lo Bianco, direktoro de nacia lingvinstituto, ĝi citas la tiaman ĝeneralan sekretario de Eŭropa Esperanto-Unio, Dafydd ap Iŝus: “Nepra legaĵo, se ni preventu lingvan katastrofon en Eŭropo rapide anglalingviĝanta”. En la antaŭparolo, kies la du unuajn alineojn Phillipson verkis speciale por la esperanta eldono, pluraj esperantistoj estas dankitaj pro siaj sciigoj pri la evoluo en la eŭropa lingva politiko.

Anna Ritamäki

Thorsen-apogo je dispono de bibliotekoj

Esperanto-bibliotekoj havas denove ŝancon akiri senkoste librojn, kiuj mankas en iliaj kolektoj, ĉar jam por la deka fojo UEA disdonas subvenciojn de la Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen. Por subvencio rajtas kandidatiĝi bibliotekoj, kiuj ne estas subtenataj de ŝtata, urba aŭ alia publika instanco. Interesitaj bibliotekoj sendu priskribon pri si kaj liston de dezirataj libroj laŭ ordo de prefero. Petoj pri diskoj, vidbendoj, k.a. ne-libraj varoj ne estos konsiderataj. La subvencion oni ricevos kiel librojn surbaze de la listo, kiu akompanis la peton. En la jaro 2005 sep bibliotekoj ricevis subvenciojn, kiuj valoris 80 ĝis 225 eŭrojn.

La petoj devas atingi la Centran Oficejon de UEA ĝis 15 okt 2006. Krom paperpoŝte (UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando), eblas sendi ilin ankaŭ rete al direktoro@co.uea.org.

GK UEA

Post Amir la tuta grupo

La koncertado de Amir Hadziahmetović el *Esperanto Desperado* en Krakovo kaj Andrychów estis la tria E-muzikturneo, kiun en 2006 organizis ICK (Internacia Centro de la Kulturoj en Krakovo-Ĉajovice) kadre de la projekto “Lernejoj Esperanto-koncertoj”, kies celo estas permuzika informado pri Esperanto en la lerneja medio.

Tamen li koncertis ne nur en lernejoj. Lia unua koncerto okazis en ĵazklubo. Akompanis ĝin esperantlingva (interpretata por la publiko) prelego de la muzikisto pri Bosnio. La klubo *Pod Basztą* (Sub la Kastelturo) en Andrychów jam antaŭe prezentis — kunlabore kun ICK — eksterlandajn E-muzikistojn.

Tri koncertoj okazis en lernejoj de Krakovo:

— en la Elementa Lernejo №68, konata al esperantistoj pro la ĉiujara vojevodia fremdlingva artkonkurso “Proksimiĝu al la Mondo”, kiun partoprenas ankaŭ Esperanto-klasoj;

— en la Speciala Lern- kaj Edukcentro por Nevidantaj kaj Malbone Vidantaj Infanoj, kie en 2000 okazis Pola E-Kongreso kaj kies lernantoj, gvidataj de la instruistino, Elżbieta Pluta, muzikas en Esperanto kaj partoprenas la konkurson “Proksimiĝu al la Mondo”;

— en infanvartejo, en la kvartalo Nowa Huta.

Dum la koncerto en la lernejo №68, 150 lernantoj bonege kantis unuvoĉe: “Esperanto estas la lingvo por ni!” Tio okazis en lernejo, en kiu la Internacia Lingvo ne estas kaj neniam estis instruata... La koncerto estis akceptita varme kaj spontane. Amir disdonadis dum 40 minutoj sian aŭtografon al longega vico da lernantoj, estis invitita de unu klaso kaj intervjuata de lernantinoj-jurnalistinoj de la lerneja gazeto.

La muzikemaj nevidantaj kaj malbone vidantaj infanoj reagis dum la koncerto per ĝojkrioj. Kun Amir muzikis Grzegorz Dowgiałło, talenta nevidanta ĵaz-pianisto.

Koncerto de la tuta *Esperanto Desperado* estas planata por 1 okt en la ripozurbo Rabka, inter Krakovo kaj Zakopane. La koncerto iĝis preteksto por organizi grandan regionan feston, dum kiu la Esperanto-muzikon denove ĝuos larĝa publiko.

Aliĝu al la koncerto ĉe:

✉ MCKultur.ICK@gmail.com

☎ +48 12 638-14-49.

Maria Majerczak



Krakovo. Post la koncerto en la Centro por Nevidantaj: Grzegorz Dowgiałło, Amir, Elżbieta Pluta kaj ŝia filino, Joanna. (Fotis Krzysztof Pluta)

Hej horilko, kiu blankas...

jOmO slavumas: K-Disko. — Donnevill: Vinilkosmo, 2006.

Japana rusroka bando *Niplets* el Osako multe pli slavos ol la freŝa albumo de jOmO/*Liberecanoj/Solniŝka* parte jida, romaa, hungara kaj eĉ tjurka, abunde kovrita per matrjoŝkoj, ĥohlomaj ornamoj kaj atlasa kozaka pufpantalono (por plena feliĉo aĉetendu lutreola ĉapo kun sovetarmea kokardo) por bombaste ŝprucu balalajke ĉipa estetiko de Aliosza Awdejew kaj Ivan Rebroff, des pli *Cossack Patrol* (pardonon, *Kampeto kampo*) same enestas kaj ekzotikaj krokodilaĵoj (“raz, dva, tri, jeszcze raz”, “ja bo bo bom ja bo boj”, “o, romale, o, ĉavale, deluli ĉaĉo nane”, “hajde, dajde” ktp.) ankaŭ ne mankas.

Oni prave rajtas priridi falsukrainan pseŭdofolkloran figrafomaniaĵon por la belorusa popolpopo *Kasiŭ Jasj kanjushinju* kun regea gitarritmo de *Manu Chao* kaj preskaŭparodian strebon superi la pimpon de Nataša Gerlaĥ en la refreno de kvaŝaŭtentika EoLA-movada bardaĵo, sed se socie akcepteblas la parizumo de *Vopli Vidopljasova* el Kievo, kial do k-do Jean-Marc Leclercq ne kantu *Rozprjahajte ĥlopci konej* en Tuluzo?! Honeste dirante, kiu krom francoj vere amas nin, la slavojn, en Eŭropo?!

Slavumo estas rara mensmalsano — sufiĉas la manfingroj de unu homo por

kalkuli ĉiujn slavemajn eksterslavanojn: *Robotniĉka*, *Vialka*, *The Ukrainians*, Milovan Srdenoviĉ kaj kelkaj imitantoj de Goran Bregoviĉ havas nulan ŝancon konkuri kun *Californication* de *Red Hot Chili Peppers*. Konsole Kalifornio produktis *Rocky IV* kun la kapitano Ivan Drago, *Red Heat* kun la kapitano Ivan Danko, la generalon el *Six-String Samurai* kaj la idioton nome Taras “Made In USA” Bulba.

Bremsita far ĥimera ideologio, stalinisma propagandmaŝino anstataŭ efektiva strategio de masiva atakado per agresiva kulturviruso poiomus disbalanci la esencon de antagonisma sistemo, elspezis valoran homarenerĝion stultege kaj nelogike: absurda impeto totalkontroli la kopirajton per absoluta monopolo de oficiala mondkoncepto, tabuigo de egoaj kreaĵimpulsoj, demonigo del’ tutspaco for del’ getta limruĝo. Rezulte protesta intereso al ĉio “kapitalisma” transformiĝis en amasmanion, “komunismo” sukcese bankrotis, ĉar ne eblas eterne vivteni la karnon sur la peka Tero kreante nenion krom la halucinoj... La berlina muro gaje dispecigita, Okcidentan Eŭropon ekskualis gastlaboristaj svarmoj el t.n. “socialisma landaro” kaj evidentiĝis, ke “civilizita mondo” same kuelele punas pro senpermesa distribuo de io ajn kaj ne tre studemas la geografion oriente de Odero... Sed pluse nenion komprenas pri slavoj.

Tamen Jomo ja estas ne tia!! Li havas polan edzinon, koncertis por 300 prizonuloj en Ivanovo, babilis “Maĥno-maniere” en Gulĵaj-Pole... Oftaj vizitoj al eks-USSR donis utilan sperton pri primitivisma aranĝspecifiko de orienteŭropaj rokuloj, eĉ ekruŝis ĉiama franca prononco... Ĉu li vere trovis la ŝlosilon por mirakla slava animo?? Mi 100-procente certas, ke ne.

Plej sukcesas la titoloj kie Jomo ne kantas (se li trinkus vodkon, ne aspektus tiom aliplanedume), t.e. *Ĝelem ĝelem* kun Neno kaj *Verda saliko* de Zirka. Sincerintensa voĉdolĉo de Irina Lebedeva estas apenaŭ unusola adekvata elemento en tiu internacia surrealistma cirko de senriproĉaj oreplezuristoj nostalgie ŝlagri dank al sorsorĉo de Triboulet.

Ricevonte la diskon ne rapidu mokkomenti mp3-ojn icq-e. Prefere organizu kuireje intiman esperanto-kunvenon por jomoroke ŝikvesperi helpe de pimenta brando, lardo kaj salitaj tomatoj, do post la horo viaj gastoj nepre postulos la ripeton, eĉ se neniam antaŭe slavumis.

Glebo Malcev

Belartaj konkursoj de UEA en 2006

Poezio: 1a premio: Francisco Javier Moleón (Hispanio) pro “Sed tiam” kaj Christian Rivière (Francio) pro “Kvankam silenti”; 2a premio: Neide Barros Rego (Brazilo) pro “Mistero”; 3a premio: Helena Melnikova (Ruslando) pro “Mia lando”. Partoprenis 33 verkoj de 18 aŭtoroj el 12 landoj.

Prozo: 1a premio: Paul Gubbins (Britio) pro “Nia paradizo bonvenigas”; 2a premio: Tim Westover (Usono) pro “Meduzet”; 3a premio: Sten Johansson (Svedio) pro “Tomatoj el Nederlando” kaj Lena Karpunina (Germanio) pro “Trovej kaj perdi”. Partoprenis 17 verkoj de 11 aŭtoroj el 9 landoj.

Eseo: Premio “Luigi Minnaja”: Aleksandr Melnikov (Ruslando) pro “Ekparolu por ke mi vin vidu — aŭ ĉu esperantisto rekoneblas laŭ paroloj”; 2a premio: Christian Rivière (Francio) pro “Tamen kompreni” kaj Jan Werner (Ĉeĥio) pro “Pri bono, malbono kaj multkulturismo”; 3a premio: ne aljuĝita; honora mencio: Anna Bennett (Usono) pro “Neperforta komunikado”. Partoprenis 9 verkoj de 9 aŭtoroj el 8 landoj.

Teatraĵo: 1a kaj 2a premioj: ne aljuĝitaj; 3a premio: Marko Nikolić (Serbio) pro “Nia diligenta kolegaro”; honora premio: Li Shijun (Laŭlum; Ĉinio) pro “Cignoj”. Partoprenis 4 verkoj de 2 aŭtoroj el 2 landoj.

Kanto: 1a premio: ne aljuĝita; 2a premio: Anja Karkiainen (Finnlando; teksto) kaj Tarcísio José de Lima (Brazilo; muziko) pro “Multe pli ol simpatii” kaj pro “Oraj horoj”; 3a premio: ne aljuĝita. Partoprenis 12 kantoj de 10 aŭtoroj el 5 landoj.

Infanlibro de la jaro 2005: “Arne, la ĉefido” de Leif Nordenstorm (Svedio), eldonita de KAVA-PECH (Ĉeĥio). Partoprenis 2 libroj de 2 eldonejoj el 2 landoj.

Filmo: 1a kaj 2a premioj: ne aljuĝitaj; 3a premio: Joe Bazilio Costa (Brazilo) pro “Tiel estas la vivo”; honora mencio: Kim Henriksen (Danlando) pro “Tri muzikvideoj”. Partoprenis 2 konkursaĵoj de 2 aŭtoroj el 2 landoj.

Ricevitaj libroj

Boito, Camillo. *Senso* / Tradukis el la itala Jean-Luc Tortel; Antaŭparolo de Carlo Minnaja. — Dobřichovice: KAVA-PECH, 2004. — 72 pĝ. — [Recenzoekzemplero].
Cibulevskij, Dmitrij. *Enciklopedio de historio de la E-movado en USSR*. — Ĥarkiv: dmic, 2002. — 168 pĝ., il. — [Aĉeto].

Gvidlibro 2006 / Red. Roy McCoy. — Rotterdam: UEA, 2006. — 96 pĝ., il. — [Donaco de UEA].

Jarkolekto de TAKE. 2005 / Red. Jan Werner. — Wintzenheim: TAKE, 2005. — 68 pĝ., il. — [Donaco de B.Ĉupin].

Jarlibro 2006 / Red. Roy McCoy. — Rotterdam: UEA, 2006. — 286 pĝ., il. — [Donaco de HaGo].

Nguefack Zedong, Chamberline; Nyeck Liport, Herman. *Historioj... Rakontu! Aŭ la Saĝulo, la Ruzulo kaj la Idiotulo: Instruaj rakontoj el Afriko*. Douala: Afriko-Naturo-Esperanto, 2006. — 127 pĝ., il. — [Donaco de *Skonpres*].

Pasporta Servo 2006: La adreslibro de gastigantoj sub aŭspicioj de TEJO / Kompilis Derk Ederveen. — Rotterdam: TEJO, 2006. — 226 pĝ., il. — [Membroekzemplero].

Poška, Antanas. *Requiem*: Miniaturaj. En la litova kaj Esperanto / Tradukis el la litova Vida Beinortienė. — Kaunas: Ryto varpas, 2005. — 270 pĝ.; 1000 ekz. — [Donaco de LitEA].

Serrano Pérez, Luis; Torné i Grau, Santiago. *Diccionari Català-Esperanto*. — Barcelona: Barcelona Esperanto-Centro, 2006. — 8 pĝ. + 271 pĝ. — [Donaco de BEC].

Ricevitaj gazetoj

EAB Update. 2006/34; Esperanto aktuell. 2006/3; Esperanto en Skotlando. 2006/193; Esperanta Finnlando. 2006/3; Esperanto USA. 2006/2; Femina. 2006/5,6; Florenca Lilio. 2006/1,2,3,4,5,6; Heroldo de Esperanto. 2006/3,7,8; Informilo por Interlingvistoj. 2006/2; Internaciisto. 2006/4; KAE-Informilo. 2006/55; Kataluna Esperantisto. 2006/104; Komentanto. 2006/1,2,3; La Movado. 2006/661,665,666; La Ondo de Esperanto. 2006/7; La Revuo Orienta. 2006/5,6,7; La Sago. 2006/27; Literatura Foiro. 2006/221; Litova Stelo. 2006/3; Mikrofono. 2006/13,14; Monato. 2006/4,7,8-9; Pola Esperantisto. 2006/3; REGO. 2006/3; Scienco kaj Kulturo. 2006/3; Sennaciulo. 2006/6,7; Service de Presse. 2006/27; Venezuela Stelo. 2005/77.

Gazetoj

Literatura Foiro. 2006: 221

Verki en senpaca mondo, la prelego de Günter Grass prezentita dum la 72a Mondkongreso de PEN-Klubo Internacia en Berlino antaŭ unu monato, trovas dignan lokon en la junia *Literatura Foiro*, kie oni omaĝas ankaŭ la dek-jariĝon de la Universala Deklaracio pri la Lingvaj Rajtoj (subskribita ankaŭ de la Esperanta PEN-Centro).

Du verkistaj atelieroj estas en la fokuso de la revuo. Ljubomir Trifonĉovski komentarias la decidon de Gabriel García Marques ne plu verki. Carmel Mallia rakontas pri sia unua esperanta romano *Ĉielarka estonto*.

En la rubrikoj pri originala literaturo la legantoj ĝuos poemojn de Marie-France Conde Rey kaj Peter Browne. Radosław Nowakowski eseeas pri la soleco.

Kaj brazila akcento en la numero. Du tradukitaj rakontoj: *Ombrejo* de He-loísa Seixas (tradukis Aloísio Sartorato) kaj *La donaco* de José Ribamar Leite de Azevedo (tradukis Pekim Tenório Vaz). Sneĵinka Angelova prezentas la porinfanan libron kun bildoj *La adiaŭo de la armiloj* de Salvador Borges Filho, tradukita en esperanton de Neide Barros Rêgo. Floriano Pessoa daŭrigas la lingvan debaton pri semantiko (komentita en la aprila numero 220 per la artikoloj de Dimitar Haĝiev kaj László Radácsy). Pri hungara amatoro inter la planlingvistoj de la 19-a jarcento rakontas Márton Fejes.

Giorgio Silfer, Carlo Minnaja kaj Lu Wunsch-Rolshoven diskutas pri Esperantio post la falo de la Berlina muro, kvazaŭ recenze pri la libro *Historio de Esperanto*, verkita de Aleksander Korĵenkov (eldonita de *Sezonoj* la pasintan jaron). Ankoraŭ unu kulturpolitika teksto vokas atenton en la numero: Gbeglo Koffi komentarias la Deklaracion pri la esenco de la afrika esperantismo.

Kiu faras la veron, venas al la lumo: per tiuj vortoj, el la Evangelio de Johano, Hubert Michael Schweizer reagas al artikolo de Armando Zecchin en la antaŭa LF 220, kadre de la debato pri la krucumitaj kune kun Jesuo ĉe Golgota. Pri la savo de 50 mil bulgaraj hebreoj dum la dua mondmilito estas la artikolo de Angel Vekov.

Kino: *Da Vinci kodo* per elzeviro de Nicolas Vanof.

HeKo

Al la maja tasko *Gerda malaperis* venis 11 respondoj. Nur 4 estis seneraraj!

La ĝustajn solvojn sendis Edmund Grimley Evans, Malcolm Jones (Britio), Hanna Skalska (Pollando), Vladimir Vyčegjanin (Ruslando). Kun unu-du mankantaj titoloj (sed kun aliaj elspuritaj) estas la solvoj de Erkki Kemppainen, Bruno Lehtinen (Finnlando), Hans-Burkhard Dietterle (Germanio), Ester Olsen (Norvegio), Dorota Burchardt (Pollando), Roland Larsson (Svedio), Roland Thibault (Usono).

La loto donis libropremion al Malcolm Jones. Ni gratulas lin!

La ĝustaj titoloj estas kursivigitaj en la suba teksto.

Gerda malaperis!

Ankoraŭ ĉi-matene ŝi gaje petolis apud la domo, inter *pajleroj kaj stoploj* de tritika kampo. Jen staras *diverskolora bukedeto*, kiun ŝi kolektis tie. En miaj oreloj ankoraŭ sonas ŝia voĉeto: “Panjo, *koko krias jam!* Tempas vekigi! Hodiaŭ mi promesis ludi kun *la knaboj de Paŭlostrato*; ili atendas min! *La granda Meaulnes* montros al mi *la maŝinon kiu kriis!*”

Mi sciis, ke tiu granda Meaulnes estas *la knabo frenezeta*. Ho, kial mi ne demandis ŝin, kien ĝuste ili iros??! Sed ŝi ja neniam respondas al tiaj demandoj. Ŝi nur mokete diras: “*Tien, laŭ mia pado*”, kaj montras permane al kampa senlimo, kie serpentumas leĝere tiu padeto, laŭ kiu ŝi kutime foriras al sia lando de revo. *Preter la horizonto* volviĝas tiu pado, kaj kondukas ĝi al *nigra insulo* de neesto, kie malaperis mia priplorinda knabino.

Ĝis revido, krokodilido mia!

Amantaj paroj

La suba listo de 16 personoj enhavas 8 amantajn parojn. Dekomence parigu la disigitajn geamantojn. Poste atentu la ciferojn, kiujn vi vidas enkrampe post ĉiu nomo. Adiciu la nombrojn de ĉiu paro aparte. En ĉiu paro vi ricevos nombron, kiu korespondas al certa litero de Esperanta alfabeto (a = 1, b = 2 ... z = 28). El tiuj literoj kunmetu vorton kaj sendu ĝin al la redakcio antaŭ 15 okt 2006.

Adamo (3), Io (10), Julieta (5), Marko Antonio (20), Penelopo (0), Zeŭso (9), Evo (3), Narciso (6), Laŭro (13), d'Artagnan (2), Kleopatro (4), Constance Bonacieux (17), Narciso (12), Romeo (11), Odiseo (5), Petrarko (6).

Kompilis **Tatjana Auderskaja**

Kongreslanda okazo

Tio okazis en Italujo, nia ĉi-jara kongreslando.

Du samklasaninoj, la juda Rebeka kaj la romkatolika Kristina, renkontiĝis hazarde en la urbocentro post multaj jaroj. Rebeka laboris tiam en vendejo kaj Kristina, monaĥino, venis tien por aĉeti ion.

Ilia ĝojo estis granda kaj ili ekiris eksteren al la apuda parko por kunbabili.

Tiam la monaĥino eltekigis sandviĉon kaj ofertis al la judino. “Prenu. Estas en ĝi tre bongusta porka kolbaso”, — ŝi diris.

Rebeka: Ne, mi ne rajtas manĝi porkaĵon. Mi fariĝis pia.

Kristina: Lasu tion ĉi! Ni ja troviĝas en la 21a jarcento. Manĝu kaj ĝuu kun mi!

Rebeka: Bone, mi promesas fari tion, sed nur en via geedziĝfesta ceremonio!

El la reta dissendo de **Josef Ŝemer**

SPRITAJ SPLITOJ KAJ PRESKERAROJ

el la kolekto de reduktoro

Renato la grandskala

Kara Renato <...> Gravas memori ke neniu estas perfekta kaj malmultaj homoj pretas labori tiel industrie kiel vi. (Gwenda Sutton, <http://groups.yahoo.com/group/uea-membroj/message/9818>, 3 mar 2006)

Profilŝanĝo ĉe IEM?

Ship to: [“sendu al”]: 33513, Internazia Esperanto - Muzeo Wien, Pf. 308, AT-1015 Wien. (leterkapo de fakturo sendita al UEA; havigis Ionel Onet)

La sekura adreso

Universala Esperanto Asocio / Belartaj Kokusoj / Neuwe Binnenweg 176 / Belartaj Kauksoj / Rotterdam, Netherlands. (letero sendita al UEA; havigis Ionel Onet)

AltFLUGe

Post interesaj intersanĝoj, ni finis la kunveno per foto kun reprezentanto de FLUG. (Raporto de la Linuks-uzantoj kunveno // *Florenca Lilio*, №4, pĝ. 2)

Niaj primatoj

Necesus spertoj de tiuj, kiuj kompetentas pri lobiado kaj kiuj estas proksimaj al decido-farantoj. (Raporto de Jukka Pietiläinen el la subkomitato pri informado al la Komitato, 1 aŭg 2006)

Plukis **István Ertl**

15 jaroj da Ondo

La Ondo vivas jam dek kvin jarojn post la refondo, kaj mi gratulas la respektindan magazinon okaze de ĉi tiu jubileo:

*Dek kvin jarojn La Ondo kuras
Tra la mond' al la verda kor'
Kaj per lum' de la vort' poluras
Novan senton dum la labor'.*

*Verve helpas la lingvon regi
Spritaj splitoj, versaĵ', rakont',
Kaj recenzoj invitas legi —
Plivastiĝu la horizont'!*

*“Lir” alvokas, kaj kursoj pasas
En vastejoj de l' tuta mond'.
Ion gravan ĉu preterlasos
La impete kuranta Ond'?*

*Esperantologiaj skizoj
Inklinigas al esplorem',
Kaj en bru' de movadaj krizoj
Vivas dubo, disput', problem'.*

*Jen parolas elstaraj homoj,
Bolas voĉoj de l' fid' kaj fam'
Grandaj faroj kaj grandaj nomoj —
Ĉu l' ideo ne venkis jam?!*

*Laŭ la literaturdestino
En la ĉiam pli multa kvant'
Vivu longe la magazino
Por la lingvo kaj la legant'!*

Klara Ilutoviĉ

Jen plia fasko da ŝercoj el *La Praktiko*: “gazeto, kiu instruas kaj amuzas”. Ili estas plukitaj el la kolekto 1936.

Kritiko

— Kiel plaĉas al vi mia fianĉino? Mi faris bonan elekton, ĉu ne?

— Jes, certe! Sed ŝajnas al mi, ke la elekto ne estis granda.

En manĝejo

Gasto: Mi pagos per ĉeko: tio estas al mi pli facila.

Kelnero: Pardonu, sinjoro, sed ni havas interkonsenton kun ĉiuj bankoj, ke ni ne akceptas ĉekojn kaj ili ne servas tagmanĝojn.

La nova servistino

Mastrino: Kial vi purigas la fenestrojn nur de interne kaj ne ankaŭ de ekstere?

Servistino: Por ke vi povu elrigardi, sinjorino, sed la homoj ne povu enrigardi!

En vilaĝa hotelo

Gasto: Hieraŭ vespere mi metis miajn ŝuojn antaŭ la pordon, sed neniŭ atentis ilin.

Mastro: Eĉ vian monujon kaj horloĝon vi povas elmeti. La homoj ĉi tie estas honestegaj.

Inter geedzoj

Ŝi: Kial vi ne estas tia viro, kia sinjoro Petersen estas? Hieraŭ li diris al sia edzino: “Iru en la urbon kaj rigardu ĉapelon de kvardek guldenoj”.

Li: Ĉu mi iam malpermesis al vi rigardi multekostajn ĉapelojn?

Ĝuste tial!

— Estas strange, ke vi, sinjoro, ne ŝatas muzikon, kvankam ĉiuj viaj kvar filinoj muzikas.

— Tute ne strange! Se ankaŭ vi havus kvar muzikantajn filinojn, ankaŭ vi malŝatus la muzikon!

En la apoteko

— Mi petas ian bonan dormigilon por mia edzo.

— Jen, sinjorino, ĉi tiu rimedo estos taŭga por du semajnoj: poste mi donos alian.

— Jes, sed mi ne volas, ke li dormu dum du semajnoj!

Plukis Halina Gorecka



Arta Lumo logas al Finnlando

Arta Lumo — jen la nomo de internacia arta festivalo, kiun la sekvajare 100-jariĝanta Esperanto-Asocio de Finnlando organizos de 27 jul ĝis 1 aŭg 2007 en Kuopio, urbo fama pro sia altkvalita muzika oferto. La invito al la festivalo estis lanĉita en Florenco kaj la informo disvastiĝis ankaŭ dum aliaj someraj eventoj.

Per abunda, altkvalita programo EAF celas allogi vastan, internacian publikon. Klasika muziko kaj roka, poezio kaj palindromkreado, teatro kaj danco estas nur ekzemploj pri la vasta gamo de arta kreado en esperanto. La festivalaj organizantoj jam havas multajn ideojn kaj diskutis kun pluraj artistoj, sed daŭre volonte akceptas viajn konsilojn.

Verŝajne realiĝos komuna vojaĝo al la 92a Universala Kongreso. Helsinko estas unu de malmultaj urboj en Eŭropo de kiu iras rektaj flugoj al Japanio. Eblas ekflugi de Kuopio kun alveno jaŭde matene en la urbo Nagojo. Ni jam kontaktis japanajn esperantistojn, kiuj pretas helpi nin organizi interesan programon antaŭ la pluvojaĝo al Jokohamo.

✉ ArtaLumo@esperanto.fi

✉ Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki, Finnlando

Anna Ritamäki, Prezidanto de EAF

Sur la foto: Aktorino Vida Jerman kun Anna Ritamäki post la malfermo en Florenco kie la saluton de Finnlando akompanis “sorĉe brila invito al Arta Lumo”. (*Fotis Carola Antskog*)

Zamenhofa Semajnfino

La Ondo de Esperanto kaj la Ĝenerala Konsulejo de Pola Respubliko en Kaliningrado denove invitas al Kaliningrado por la tradicia Zamenhofa Semajnfino.

8 dec 2006 (vendrede) en la Konsulejo okazos malfermo kaj akcepto kun partopreno de diplomatoj, lokaj aŭtoritatoj, sociaj organizoj, ĵurnalistoj, esperantistoj. Reprezentiĝos Esperanto-Asocioj el Germanio, Litovio kaj Pollando. Pliaj asocioj estas bonvenaj.

9 dec 2006 (sabate) en la Marista Kulturpalaco (eksa Kenigsberga Borso) disvolviĝos esperantista programo kun i.a. festprelego de Aleksander Korĵenkov pri la ideologia heredaĵo de Zamenhof. En la vespera bankedo estos anoncita la rezulto de Liro-2006.

10 dec 2006 (dimanĉe) oni ripozos kaj ekskursos.

Atenton! Loĝantoj de preskaŭ ĉiuj landoj devas havi ruslandan vizon. Bonvolu ĝustatempe viziti konsulejon.

Bonvenon al Kaliningrado!

✉ RU-236039 Kaliningrad ab. ja. 1205, Ruslando


☎ (0112) 656033

✉ sezonoj@gazinter.net


<http://www.esperanto.org/Ondo/>




Fjodor Dostojevskij.
Blankaj noktoj: Ses prozaĵoj.
448 paĝoj, € 30,0.



Anton Ĉeĥov.
Ĉeriza ĝardeno: Noveloj, dramoj.
352 paĝoj, € 27,0.




Rusa Novelaro. Volumo 1
La 19a Jarcento.
400 paĝoj, € 30,0.




Samideanoj: Satiroj kaj humurajoj
pri Esperanto kaj pri esperantistoj.
80 paĝoj, € 7,5.



Georges Simenon.
Amiko el la junago de Maigret.
128 paĝoj, € 12,0.




Trevor Steele.
Diverskoloro: Originalaj prozaĵoj.
112 paĝoj, € 10,0.



Aleksander Korĵenkov.
Historio de Esperanto.
128 paĝoj, € 12,0.



L.L. Zamenhof
Mi estas homo.
288 paĝoj, € 24,0.



Aleksandr Duliĉenko.
En la serĉado de la mondolingvo.
160 paĝoj, € 15,0.